

1977 aprilo

70-a jaro

n-ro 856 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Skotlando gastigos la Antaŭkongreson

Vi trovos

sub la verda jako de ĉi tiu numero la kutiman kvanton da novaĵoj aŭ — ni preferu diru — informoj, pli aŭ malpli freŝaj. Por ke informoj estu novaĵoj necesas zorgi, ke ili en minimuma tempo atingu nian redakcion, ĉar ili nur tiamaniere akiras maksimuman ŝancon efektive aperi en ĉi tiu revuo. Ekzistas homoj, kiuj nun — fine de marto 1977 — sendas al ni ĉarmajn raportojn plurpaĝajn pri tre sukcesa Zamenhofa vespero, kiun ilia loka klubo festis bankede, en decembro pasintjare. Se ili ne trovos tiujn siajn raportojn plej malfrue en la junia numero ĉi-jare, venos poste al ni protestoj pro la neaperigo kaj ni kune pasigos la reston de la jaro en superflua korespondado. Ne kiel konsilon, sed kiel peton bonvolu noti jenon: Se io grava, kio valoras internacian diskonigon — kaj tion meritas ĉiu novstila kaj bona paŝo en la Movado —, okazas en via klubo, lernejo, sekcio, vilaĝo, urbo, regiono, provinco aŭ lando, se ĝi okazas ekz. en la komenco de aprilo, ne sidu tiam du monatojn meditante, ĉu entute, kiam kaj kiel sendi raporton al ni fine de majo. Skribu tuj la sekvan tagon post la okazintaĵo! Ne necesas nepre sendi prespretan artikolon. Sufiĉas simplaj faktoj pri la afero, el kiuj ni pli aŭ malpli facile — depende de la faktokvanto liverita de vi — kunmetos freŝan informon, mallongan, trafan novaĵon aŭ eble eĉ longetan interesan artikolon. Pripensu la fakton, ke nia revuo ne havas pagitajn raportistojn, kiuj vagus tra la vasta mondo kaj bombardus nin per informoj kaj artikoloj. Ni plene dependas de la bonvolo de niaj legantoj, el kiuj ĉiu unuopa estas nia potenciala raportanto. Ĝis!

Enhavo

- 61 Du heroldoj de estonteco (sm)
- 62 Agado en la fakoj: Pretiĝas sporta terminaro (Tibor Ujlaky-Nagy)
- 64 La lingvo: Iom pri vortordo (William Auld)
- 66 La skota popolo
- 67 Vi povas helpi
- 68 Nekrologo: Paŭlo Balkányi 1894-1977, Iniciatoj: Lingvo por la aero
- 69 Leterkesto
- 70 La iama Islando: Leteroj el lafolando (Julie Tonkin)
- 72 Recenzoj ("Homa animo", "Filigranoj el lumo", "Lingua e politica", "Dum la noktoj", "Rimleteroj", "Esperanto programato")
- 74 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 75 TEJO-paĝo: Tel-aviva "Krokodilo" (Amri Wandel), Ankaŭ BEJO estas sen ejo, IJK-kotizoj
- 76 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 78 Esperanto en radio — kompleta tabelo
- 79 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Ekzameno E (Bernard Golden)
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

Ĉar en nia marta numero sur la kovrilpaĝo pompis angloj, estas juste, ke la aprila kovrilo apartenu al skotoj, kies idilian landon bone prezentas la lago Port of Menteith (sur la foto). Se eventuale ŝokis vin nia kovrila bildklarigo, laŭ kiu skotoj "gastigos" la Oficialan Antaŭkongreson de la 62a UK, memoru, ke la anekdotoj restas ja nur anekdotoj kaj malofte trovas firman bazon en la realo. Cetere, estante ĉi tie en Nederlando, ni lastatempe aŭdis asertojn, ke tiuj anekdotaj skotoj fakte ne estas skotoj entute, sed nederlandanoj, kiuj transnaĝis la Nordan Maron. Kompreneble, ke ĉio ĉi estas nur unu plia malica elpensado de belgoj pri siaj nordaj najbaroj. Sed, ĉiukaze ne preterlasu legi la tekston sur la paĝoj 66 kaj 67, eĉ se vi ne iros al la Antaŭkongreso en Skotlando.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Legantoj** en 86 landoj. **Redaktoro:** Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Beethovenlaan 6, Doorwerth 6865 EA, Nederlando; tel. (085) 33 56 31.

Du heroldoj de estonteco

La 14an de aprilo estos la sesdeka datreveno de la morto de d-ro Zamenhof en 1917. Oni povus prave atendi, ke la ĉefartikolo de ĉi tiu numero tial estu dediĉita al la nobla kaj genia bjalistokano. Sed, pro niaj planoj en la julia/aŭgusta numero amplekse prinoti la naŭdekan jubileon de la Internacia Lingvo, ni limigas omaĝon de la zamenhofa datreveno nur al ĉi tiuj linioj. Ni konsideras la fakton mem, ke ĉi tiu revuo kaj dekoj da aliaj movadaj periodaĵoj ne nur ekzistas sesdek jarojn post la 14a de aprilo 1917, sed kuraĝe plubatalas por la Internacia Lingvo kaj traktas problemojn de forta tutmonda movado por Esperanto, ni konsideras tiun fakton per si mem esti unu el la plej konvenaj omaĝoj al la vivo kaj verko de d-ro Zamenhof. Tial ni dediĉas ĉi tiun paĝon al demando aŭ problemo, kiu ne ekzistis antaŭ sesdek jaroj, ne ekzistis ĉar la nivelo je kiu oni tiam kaj nun traktis/traktas la demandon de la Internacia Lingvo esence ŝanĝiĝis.

EN LA LASTAJ TRI JAROJ al la granda familio de la Esperantaj periodaĵoj aldoniĝis du novaj anoj. Ili ambaŭ estis aklande akceptitaj, ĉar ambaŭ estis novaĵoj, veraj eventoj, kaj ne simple du pliaj, ofte nenecesaj stencilaĵoj, kiuj sin proklamas revuoj kaj siajn tajpantojn nomas ĉefredaktoroj. Temas ĉi tie pri *Eŭropa dokumentaro*, ekaperinta en 1974, kaj pri *Scienca mondo*, lanĉita en 1976. La unuan eldonas Centro por Eŭropa Edukado en Bruselo, kaj la duan Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj en Sofio. La unua periodaĵo jam spertas, kaj la dua baldaŭ spertos problemojn, kiuj minacas malaperon de la gazetoj. Ĉar temas pri revuoj

eŭropa dokumentaro



Centro por Eŭropa Edukado

13

JANUARO - MARTO
1977

Scienca
mondo

3

eldonataj en la Internacia Lingvo fare de internaciaj, ekstermovadaj instancoj, pri revuoj, kiuj ne traktas movadaĵojn sed simple uzas Esperanton kiel komunikilon, la demando de ilia bonfarto meritas plenan atenton de la esperantistaro. *Eŭropa dokumentaro* kaj *Scienca mondo* estas ja heroldoj de tiu estonteco por kiu ni ĉiuj batalas. Tiuj du periodaĵoj kaj la internaciaj organizaĵoj, kiuj ilin eldonas, jam akceptis kaj iusence oficialigis la Internacian Lingvon. Ili estas du oazoj en ĉi tiu monda maro de indolento pri la lingvaj problemoj, du trarompoj en la dikaj muroj de la fortikaĵo en kiu regas lingvaj imperiismo kaj diskriminacio. Ĉu la Movado konscias pri tio? Se juĝi laŭ disponeblaj

faktoj, oni komencas dubi, ke la Movado ĝuste aprezas la du revuojn. Rigardu mem:

En la fino de 1975, *Eŭropa dokumentaro* havis 800 abonantojn kaj oni esperis atingi 1000, por i.a. plibonigi la jam bonan aspekton de la revuo. Sed la jaro 1976 portis ŝokan ŝrumpo de la nombro de abonantoj, kiu malaltiĝis al nuraj 423. En la unuaj tri monatoj de ĉi tiu jaro, oni ankoraŭ ne sukcesis atingi la pasintjaran nombron, kiu jam estis alarma kaj pensigis la eldonanton, ĉu valoras daŭrigi la vivon de la revuo.

Scienca mondo, kies unua numero aperis dum la 61a UK en Ateno, kaj tiam proponis sin al la esperantistaro kontraŭ bagatele malalta jara abono de unu usona dolaro aŭ egalvaloro, ankoraŭ batalas por siaj abonantoj. Ĝi spertis la kutimajn problemojn kapti la eldonritmon, kio ŝajnas baldaŭ solviĝi, ĉar lastatempe aperis la numeroj 2 kaj 3 el la jarkolekto 1976. La prizorgantoj de *Scienca mondo* sukcesis ĝis nun dissendi nur unu cirkuleron por atentigi pri la graveco de la nombro de abonantoj. Tamen, se la Movado atentos ĝin kiel la revuon *Eŭropa dokumentaro*, alarmoj venos ankaŭ el Sofio.

Pri ambaŭ eldonaĵoj nia revuo amplekse skribis antaŭe (v. niajn n-rojn de oktobro 1974 kaj aprilo 1976). Ambaŭ revuoj estas aboneblaj ĉe la Libroservo de UEA* kaj ĉe pluraj aliaj internaciaj kaj landaj libroservoj. Malgraŭ la intertempaj prezaltiĝoj, ili ambaŭ restas relative malmultekostaj. Kio do estas la problemoj? Enhavo? Tio estas malfacile kredebla, ĉar se io mankas en la familio de Esperantaj periodaĵoj, tio estas ĝuste revuoj en kiuj eblus legi en Esperanto pri ne-Esperantaj temoj. *Eŭropa dokumentaro* kaj *Scienca mondo* estas ĝuste tiaj revuoj. Ili do meritas ne nur subtenon sed tre zorgan vartadon, ĉar depende de iliaj spertoj ankaŭ aliaj nemovadaj instancoj komencos aŭ ne komencos uzi — t.e. oficialigi — la Internacian Lingvon.

* Ĉe la Libroservo de UEA jarabono de *Eŭropa dokumentaro* kostas 15,00 (por Nederlando 15,60) gld., kaj tiu de *Scienca mondo* 7,50 (por Nederlando 7,80) gld.

Pretiĝas sporta terminaro

Kvankam ni ne sukcesas ofte raporti pri tio, ŝajne okazas tre vigla aktiveco sur la sporta agadkampo. Krom la laboroj faritaj okaze de la Olimpiko en Montrealo (v. nian n-ron de marto 1976, p.51), d-ro Polerani, UEA-komisiito pri sporto, informas pri novaj iniciatoj, ligitaj i.a. al la venonta Olimpiko en 1980, en Moskvo. Multo el la movada aktiveco sur la sporta kampo okazas en Hungario. De tie venis ankaŭ la sekvanta artikolo, kiu fakte estis letero, kiun ni artikoligis.

MIA LIBRO *La sporta lingvo en Esperanto* aperis en 1972, kiel eldono de Hungara Esperanto-Asocio. La necesan sumon, kiu kovris ĉiujn elspezojn (tajpado, presado, poŝtaj kostoj ktp.), disponigis grandanime, en egala proporcio, tri hungaraj institucioj: Hungara Olimpika Komitato, Landa Akvoafera Instanco kaj Kleriga Ministerio. La libro estis 300-paĝa, fote multobligita verko. Ĝi aperis nur en 500 ekzempleroj, ĉar mi verkis ĝin nur kiel projekton, do ne por la granda publiko. Mia celo estis nome kolekti per ĝi utilajn kritikojn, prijuĝojn, proponojn pri eventualaj ŝanĝoj de miaj terminoj, ktp. flanke de tiel sportfakoj kiel en Esperanto spertaj personoj, por utiligi poste la ricevitan materialon en la prilaborado de definitiva eldono (kiu ne realiĝis).

Pro tio la libro ne estis vendata, sed praktike ĉiujn 500 ekzemplerojn mi dissendis — en majo 1972, tuj antaŭ la Olimpiko en Munkeno — al ĉiuj landaj E-asocioj, akademianoj, E-redakcioj kaj sportfakaj UEA-delegitoj. Ankoraŭ en februaro samjare, unu tajpitan manuskripton mi transdonis al la Germana Esperanto-Asocio, kaj ĝi servis kiel bazo ĉe la kunmeto de la olimpika broŝuro *Saluton, amiko!*.

La eĥo en la gazetaro estis ĝenerale tre pozitiva. Ĉiuj recenzoj enhavis ankaŭ kritikojn, parte akcepteblajn, parte refuteblajn, — ja pro tio oni recenzas. Krome, mi ricevis ĉ. 100 respondleterojn de tiuj, al kiuj mi sendis ekzempleron de la libro. El la 100 respondoj, ĉ.20 okupiĝis serioze pri la temo, bonvole kritikis plimalpli multe da terminoj, proponante, aŭ ne, pli taŭgajn fakesprimojn. Plej konsciencie trastudis la tutan libron kaj faris siajn lingvaj rimarkojn sur 45 tajpitaj paĝoj Antonije Sekelj (Jugoslavio), kies senekzemplan valoran laboron kaj amikan helpon mi nek



povis, nek povos — krom per kora dankesprimoj — rekompenci. Parton de la libro, aŭ la tuton, trastudis, krome, kaj sendis al mi siajn konstruajn kritikojn kaj utilajn konsilojn ankaŭ: P.V. Bagger (Danlando), E. Bissi kaj P.Bonomi (Italio), W. Bormann (FR Germanio), R. Bossong (Nederlando), T. Fraser (Britio), B. Golden (Hungario), J. Hamvai (Nov-Zelando), R. Harry (Aŭstralio), T. Jung kaj K. Ruig (Nederlando), A. Lienhardt (Francio), J.H. Sullivan (Britio), E. Sonnenfeld (Urugvajo), G. Waringhien (Francio) kaj E.L.M. Wensing (Nederlando).

Nova projekto: Sporta terminaro en sep lingvoj

Pli supre mi menciis, ke la definitiva versio de la unua libro ne pretiĝis. Tio havis plurajn kaŭzojn. Unue, mi trovis, ke estas pli necese aperi sportan fakvortaron, ĉar por la granda amaso la primara bezono estas ne faklibro sed terminaro. Tion multaj ankaŭ diris al mi. La dua kaŭzo estis, ke kaze de nova eldono de mia unua libro estus necese denove trastudi la regularojn de 30 sporto-branĉoj, kiuj intertempe povis ŝanĝiĝi. Eble la tria kaŭzo estis, ke baldaŭ post la apero de la libro mi ekkontaktis kun R. Eichholz, komencis kunlabori kun li, korektante la sportajn paĝojn de la Esperanta *Bildvortaro* kaj liverante al li difinojn por la sportaj terminoj en la *Slipara vortaro*. Tiu kunlaboro fine de la pasinta jaro donis al mi la impulson komenci la kompiladon de sporta vortaro. Por ke ĝi estu kiel eble plej internaci-skale uzebla, mi decidis verki ĝin 7-lingve (angla, Esperanta, franca, germana, hispana, hungara kaj rusa). La vortaro sekvos jenan sistemon:

La unua ĉapitro: Esperanta difinaro. Tio signifas, ke ĉiu termino troviĝanta en la vortaro havos sian Esperantan klarigon, difinon. Tiuj difinoj estos ordigitaj laŭ la alfabeto vicordo de la 30 sporto-branĉoj (28 olimpikaj, plus teniso kaj tablotenis). Ene de la sporto-branĉoj regos certa logika ordo. Antaŭ la unua sporto-branĉo troviĝos la ĝeneralaj, en pluraj branĉoj renkonteblaj, komunaj terminoj. La terminoj estos numeritaj de 1 ĝis (eble) 3000 (provizore mi planas tiom ĉi da fakvortoj en unu lingvo, t.e. 7-oble 3000 en la vortaro). Fine de ĉiu difino estos trovebla traduko de la koncerna termino en la ses aliaj lingvoj.

La dua ĝis oka ĉapitroj: Apartaj: angla, Esperanta, franca, germana, hispana, hungara kaj rusa alfabetaj vortolistoj de la 3000 terminoj (fakesprimoj). Post ĉiu vorto (esprimoj) staros ĝia propra vicnumero, kiun ĝi ricevis en la unua ĉapitro.

Tiu sistemo havas du avantaĝojn: 1) La vortaron povos uzi ankaŭ neesperantistoj. Helpe de la vicnumera sistemo oni facile trovos la alilingvan ekvivalenton de kiu ajn termino. Tiu kriterio kreskigos la vendatecon de la vortaro. 2) Ĝi estos pluevoluigebla por kiu ajn alia lingvo. Por tio necesos nur suplementa ĉapitro, konsistanta el du vortolistoj: unu laŭ-alfabeta kaj unu laŭ-vicnumera en la nova, plua lingvo, kiu per tio jam estas enŝaltita en la sistemon. Kiel plusaj lingvoj, mi opinias, unuavice aldoniĝos la itala, japana, pola, portugala, bulgara ktp.

Kia helpo estus bonvena?

Bedaŭrinde, du internaciaj sportaj vortaroj, kiujn mi havas (seplingva terminaro en la angla, franca, germana, itala, hispana, hungara kaj rusa lingvoj; kvarlingva sporta vortaro de Langenscheidt, eldonita okaze de la Olimpiko en Munkeno), ne estas sufiĉaj. Ilia vortprovizo estas, kompreneble, pli granda ol mi volas prilabori en mia vortaro. Tamen, estas mankoj en ili. Mankas nome en la 7-lingva vortaro la nomoj de la virinaj sportistoj en ĉiu sporto-branĉo (ekz. disko-ĵetistino, korbo-pilkistino ktp) kaj la plena oficiala nomo de ĉiuj disciplinoj de la diversaj sporto-branĉoj (ekz. vira bicikla persekuto, virina duremila kvaropa remado kun stiristo ktp). Tiaj esprimoj estas tre gravaj en konversacioj inter diversnaciaj sportistoj. Krome, la seplingva vortaro ne entenas la terminojn de tri traktotaj

sportobranĉoj: bobado, sledado kaj arko-pafado. En la kvarlingva vortaro mankas la rusa kaj ĝi inkluzivas nur la somerajn olimpikajn sportobranĉojn. Tiujn mankojn mi planas kompensi per la helpo de kunlaborantoj. Tial mi turnas min al la redakcio de *Esperanto*, en la espero, ke post la apero de mia alvoko prezentos sin bonvolaj kaj taŭgaj kunlaborantoj. La alia celo estas, ke oni informiĝu pri mia laboro, por ke ne okazu eventualaj paralelaj laboroj sur la kampo de la sporta terminologio, ĉar tio estigus certe nur lingvan malunuecon, do konfuzon.


De la kunlaborantoj mi petos nur ilia-lingvajn fakajn esprimojn, kiuj en miaj vortaroj mankas. La kreado de la Esperantaj esprimoj ne estos ilia tasko, ja tio ja estas jam plejparte preta. Kompreneble, mi povos akcepti nur la helpon de tiuj kunlaborantoj, kiuj povas liveri fidele korektajn fakterminojn, por kio ili devos ofte konsulti la sportan literaturon, unuavice faklibrojn kaj regularojn.

Tre granda helpo estus, se oni povus havigi al mi — se tiu entute ekzistas — plurlingvan vortaron pri la vintraj sportobranĉoj. Mi povas imagi, ke kiel Langenscheidt eldonis sian kvarlingvan vortaron por la celoj de la somera olimpiko, eventuale simila vortaro aperis okaze de la vintraj olimpikoj en 1972 aŭ 1976.

Mi povas diri, ke provizore mi tute ne okupiĝis pri la demando, kiu eldonos la terminaron, kiam ĝi estos preta.* Mi esperas kompletigi la laboron fine de 1979. Mi estas optimisto. Por akiri la finan bazon de la eldono de mia unua libro mi faris la unuajn paŝojn nur post la pretiĝo (post kvinjara laboro) en 1972. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-okaze troviĝos ebleco eldoni la vortaron, kondiĉe ke ĝi estos verko necesa kaj bezonata. Kaj mi opinias ĝin tia.

Tibor Ujlaky-Nagy,
Vásárhelyi P. u. 12, H-1114 Budapest

* Ni ĵus eksciis, ke s-ro R. Eichholz, gvidanto de la Terminologia Centro de ISAE, faris proponon al s-ro Ujlaky-Nagy, ke la prilaborata terminaro enhavu difinojn ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla, kio grave larĝigos la merkaton de la libro. Krome, oni celu eldoni ne unu dikan volumon, sed plurajn kajerojn, dediĉitajn al unuopaj sportoj aŭ grupoj da parencaj sportoj. Se la aŭtoro de la terminaro akceptos la proponon, s-ro Eichholz estas preta entrepreni la eldonadon.



Iom pri vortordo

INTER LA KVALITOJ aŭ karakterizoj de la Internacia Lingvo, nepre menciataj de ĉiuj varbantoj, troviĝas la fleksebleco. **Esperanto estas lingvo fleksebla . . .** Kaj tia ĝi ja estas, dank' interalie al la akuzativa finaĵo kaj la akordiĝo de adjektivo kun substantivo. Pro tiu fleksebleco, talenta esperantisto kapablas, se li nur havas sufiĉe evoluantan guston, atingi altan gradon de eleganta kaj belsona lingvouzo.

La fleksebleco montriĝas antaŭ ĉio per la vortorda libero. *Plena gramatiko*, parag.400, komenciĝas:

En Esperanto la vortordo estas libera, t.e. en ĝi ne ekzistas specialaj reguloj, oni devas klopodi nur je klareco kaj bonsoneco. Ni rajtas esti tre dankemaj pro tio, ĉar ĝi tre faciligas la lernadon de la lingvo: ĉiu lernanto, kondiĉe ke li korekte konas kaj sekvas la 16 fundamentajn regulojn, kapablas sin esprimi kompreneble, sen la teda neceso atenti ankaŭ komplikajn regulojn pri la frazkonstruado. Kaj, ĉar la frazkonstruado treege varias de lingvo al lingvo etnaj, tiu faciligo estas vere avantaĝa. Sed la avantaĝoj etendiĝas eĉ pli, ĝis la plej malnaiva lingvouzado.

Bedaŭrinde, oni ĝis nun apenaŭ publikigis iujn seriozajn analizojn pri la efektivaj uzkutimoj de niaj plej admirataj stilistoj. *Plena gramatiko* dediĉas paragrafojn 400-402, do kvar paĝojn kaj duonon, al la temo "Vortordo"; tre trafaj kaj utilaj estas tiuj paragrafoj, kaj esperantisto, kiu ellernis ilin, pro tio jam posedas la elementojn de bona konversacia stilo kaj de ordinara koresponda aŭ priafera skriblingvaĵo. Sed, tie haltas *Plena gramatiko*. Ĝi tute ne turnas sin al la lingvaĵo literatura, ĉu proza ĉu poezia, kie konstateblas la rafinitaj atingoj de la subtila sinesprimado kaj la plej elegantaj nuancoj de la belsona, klara kaj fleksebla Esperanto. Probable *Plena gramatiko* ne estas kulpiginda tiurilate, ĉar la temo estas ege kompleksa; sed pri ĝi oni devos iam entrepreni seriozajn esplorojn.

Laŭ *Plena gramatiko* (PG), **La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto.** Ŝanĝi tiun normon oni povas, eĉ ofte devas. Tio estas ebla, ĉar la akuzativa finaĵo garantias la nepran rekonon de la frazelementoj. Sed oni ne faru ŝanĝon senkaŭze, ĉar nur tiamaniere oni povas atingi, ke la ŝanĝo signifion, ke oni eksentu el ĝi certan nuancon: **la akcentadon de iu frazelemento.** Nu, rilate al la ĉiutaga lingvaĵo, kaj ankaŭ al iuj aŭtoroj, kies stilo estas konscie "ĉiutaga", neniuj volas disputi, ke la dirita vortordo estas "norma". Tamen, en la verkoj de niaj kolorplenaj prozistoj (ni provizore flankenlasas tiujn strangulojn, la poetojn), kiel ekzemple Baghy aŭ Forge, aŭ sur la paĝoj de, ekzemple, la multadmirata *Literatura mondo*, ni ne povas ne konstati, ke tiu "normeco" fariĝas iom svaga, iom dubinda, ĉar tie ĉiuj eblaj

aranĝoj de la propozicioj estas troveblaj praktike sur ĉiu paĝo. Evidente eniras novaj kriterioj pri la plej bela, klara kaj eleganta vortarango. Oftegas ekzemple la kombino adjekto-predikato-subjekto: **Post la flankenturnita kurteno oscedis mallumo; En iu angulo sur la tero kuŝis granda bruna maso; Ĉe iu apudvoja arbo sur branĉo pendis longa korpo; Foje venis iu bele vestita soldato kaj multe kriadis; En la vagono ŝvebis naŭza malbonodoro kaj la soldatoj veadis; Poste okazis granda tragedio; Kie forestis la komedio?; Morgaŭ komenciĝos la granda distrikta foiro; Sur la pajlosako ekmoviĝis la bruna homforma ĉifonmaso; En la voĉo de la knabino plore vibris io tima, io ĉagrena,** ktp. ktp. (Pardonu, ili tiel facile rikoltiĝis al mia mano, ke mi entuziasme enkorbigis tro multajn ekzemplojn!). Tiu aranĝo, cetere, estas kontentige klasika: **En la mondon venis nova sento.** Instrua povas esti komparo kun la t.n. "norma" aranĝo: **Nova sento venis en la mondon!**

Apud la supozeble norma ordo subjekto-predikato-objekto troveblas — kondiĉe ke la subjekto kaj objekto estas substantivoj kaj ne pronomoj, ĉar, kiel PG prave atentigas (parag.402), la pronomoj, estante unusilabaj, formas apartan kazon — preskaŭ samofte la ceteraj eblaj aranĝoj, precipe objekto-predikato-subjekto: **Vian ploregon glutis la profundo de la kelo; La unubrakulon vokis lia devo en la najbaran vilaĝon; La unubrakulon repelis la skrupulaj timotremoj pro vi; Lian sanon la alkoholo neniigis; Liajn okulojn pinĉis la sapŝaŭmo,** ktp. ktp.

Tion PG volas, iom malprecize, klarigi per **akcentado de iu frazelemento.** Tio, laŭ mi, estas parte prava kaj parte malprava; apud la akcentado de iu frazelemento rolas ankaŭ la reciprokaj interrilatoj de la diversaj elementoj en koncerna frazo, kio estas pli subtila ol simpla akcentado de unuopa elemento. Krom tio, PG ne povas esti tute preciza pri la loko, kiun oni rigardu kiel la akcentan lokon. Ĝiaj reguloj, kiom ajn pravaj, ekzemple: **La predikaton oni akcentas metante ĝin antaŭ la subjekton,** en la fina resumo lasas nin — prave kaj dankinde! — ankoraŭ en granda libereco:

Kiel ni vidis, la loko de l' plej forta akcento estas la komenco de la frazo: tiu akcento tamen ne validas por la subjekto, ĉar tie ja estas ĝia loko kutima. Alia akcenta loko estas la fino de la frazo (parag.402).


Jes, kaj pro tio, ke ankaŭ la kunteksto ludas rolon en la akcentado, ankaŭ la mezo de la frazo kelkfoje elstaras: **Oni rimarkis ĝuste en la mezo de la planko la perditan ludilon.**

Klare, en la kombino adjekto-predikato-subjekto, la fino de la frazo estas plej forta.

Kaj ĝenerale en la kombino objekto-predikato-subjekto la komenco de la frazo estas plej forta. La ofteco de

tiu kombino havas, laŭ mi, specialan klarigon. Miaj studoj pri la stilo de niaj plej vivaj kaj naturaj verkistoj konvinkis min, ke tiu kombino plenumas en Esperanto la rolon de pasivo en pluraj eŭropaj lingvoj. Ni ĉiuj scias, ke Esperanto posedas pasivon; sed la efektiva lingvaĵo de niaj bonaj stilistoj — precipe beletristoj — elokvente pravas, ke pasivoj estas uzataj relative malofte. Kie la aganto ne estas menciota, oni uzadas aktivan kun "oni": **Pasivojn oni uzas relative malofte.** Kie la aganto estas menciota, oni uzas aktivan, sed — kiel ĉe pasivo — metas unue la ricevanton kaj fine la aganton. Ekzemple, la jam citita frazo: **Vian ploregon glutis la profundo de la kelo** estas ekvivalento de **Via plorego estis glutita de la profundo de la kelo.** Klare, la aktiva aranĝo estas pli trafa, pli eleganta, pli senpera kaj pli konciza ol la pasiva; kaj same klare, la ebleco meti sur la unuan lokon la ricevanton de la ago plenumas la saman rolon en la aktivo kiel en la pasivo.

La aranĝado de iu propozicio, kompreneble, estas afero unuavice de gusto, kiu baziĝas sur kriterioj pri belsoneco, eleganteco, ekzakteco kaj klareco. Supozeble ĝi fine ne estas reduktebla al regulsistemo — oni devas "aŭskulti al ĝia sono". Cetere, oni ne forgesu, ke propozicion oni konstruas ne en izoleco, sed en rilato al ĉiuj ĝin ĉirkaŭantaj prepozicioj. Oni volas variigi la frazkonstruadon por eviti monotonecon.



Ilustraĵo el la Bulteno de Meksika Unesko-Komisiono.

Verŝajne la plimultaj stilistoj verkas pli instinkte ol konscie. Se mi rajtas citi ekzemplon personan: Tradukonte la ŝekspiran dramon *Epifanio*, mi eksidiĝis antaŭ la unua verso: **If music be the food of love, play on**, kaj mi skribis jenon:

Se nutras amon la muziko, ludu.

Pasis kelkaj jaroj ĝis mi rimarkis, ke fakte en tiu momento al mi estis ebla elekto inter minimume ses eblecoj, el kiuj la ceteraj kvin estas:

Se amon nutras la muziko, ludu

Se la muziko nutras amon, ludu

Se amon la muziko nutras, ludu

Se la muziko amon nutras, ludu

Se nutras la muziko amon, ludu

Eble, mi ne scias, iuj legantoj konkludos, ke la plej bonan alternativon mi tamen ne elektis; sed neniu leganto, kiu havas eĉ minimuman sentemon, asertos,

ke la plej trafa alternativo estas la "norma", konversacia ordo: **Se la muziko nutras amon, ludu.** En tiu kunteksto ĝi estas nepre la plej malforta. La leciono de tiu historio estas, ke en ĉiu momento la Esperanta verkisto, kiam temas pri vortordo, havas larĝan elekton inter siaj esprimrimedoj.

Evidente kaj nature, ĝuste en la poezio ni trovas la plej rafinitan kaj esprimivan lingvaĵon — kaj ĝuste niaj poetoj instinkte (tio estas ilia talento kaj metio) dismetas siajn lingverojn plej efike kaj eluzas la fleksiblajn trajtojn de nia sintakso. Tre maloftaj estas poemoj, kies lingvaĵo **neniel** diferencas de la konversacia lingvaĵo. Ĝenerale, se la vortprovizo estas konversacieca, la poemo ricevas sian dinamicon per "nenorma" frazkonstruo:

**Sanktulinon mi ne vidas
en virina homo,
vane tion predikadas
papa Moŝt' en Romo.**

(Mi ne vidas sanktulinon...). Se la frazkonstruo estas konversacieca, ĝi ricevas sian dinamicon per nekutima (= nekonversacia) vortuzado:

**En tiu temp' ni estis bando
Ne el paper', ne el kartono,
Ne kiel kotiljongirlando,
Sed brava band' el fajroŝtono.**

Ĉar poemo sen dinamico jam ne estas artverko sed maksimume nur okaza rimaĵo (aŭ versaĵo):

**Nia Esperanto vivas,
Floras ĉie sur la tero,
Ĉie nia lingvo servas
Al la bono, belo, vero.**

Miaj spertoj ĉe studentoj kaj scivolaj "simplaj" (tiel ili sin nomas) esperantistoj konvinkis min, ke ĝuste la fleksebleco de la vortordo (multe pli ol la literature abunda vortprovizo) estas la ĉefa malhelpo al senpera kompreno de poemoj flanke de relative senspertaj legantoj. Iom da ekzerciĝo pri analizado de la frazeroj rapide forigas la barilon kaj la signifojn oni pli kaj pli senpere komprenas, ĝis fine oni atingas fluan legkapablon. Al multaj lernantoj tio efikas kiel revelacio, kaj ili finfine konstatas la veran belon de Esperanto kiel aparta, speciala, ekscita lingvo, kiu stimulas ilian fantazion. Kaj tial ŝajnas al mi malbone, kvazaŭ kaŝi al la lernantoj kaj progresantoj tiun liberigan karakterizon de nia lingvo. Tro multaj esperantistoj en la realeco komprenas la signifon de Esperanta frazo nur pere de la norma vortordo kaj ĝuste pro tio mem neniam plenfide regas la finaĵon akuzativan — kaj ĝuste pro tio kelkaj el ili eĉ rigardas ĝin kiel superfluan! Espereble mi sukcesis atentigi la legantojn pri la granda fleksebleco de la **efektive uzata**, ne nur en la literaturo, Esperanto. Niaj amikoj tion ignorantaj pensigas pri versaĵo de C.E.R. Bumy en alia, sed parenca, kunteksto:

**Se knabo volas kuri,
piedojn liajn ŝnuri,
kaj poste miri, miri,
ke li ne povas iri. . .**

William Auld



La skota popolo

La ĉi-supra statuo memorigas pri la reĝo Roberto la Unua, kiu liberigis Skotlandon de la angloj en la jaro 1314. En la fono de la bildo oni vidas turon, kiu memorigas pri alia skota heroo, William Wallace. Tamen, la kaŭzo de la fakto, ke vi trovas ĉi tiujn foton kaj sekvan tekston en nia revuo — kaŝas sin malantaŭ la monteto sur kiu staras la turo: Tie situas la Universitato de Stirlingo, kiu inter la 26a kaj 29a de julio 1977 gastigos la Oficialan Antaŭkongreson de la 62a UK. Brita parlamentano mag. George Reid, membro de la Parlamenta Esperanto-Grupo en Britio, estas la Honora Patrono de la aranĝo, kiu — kompreneble — okazos sub la aŭspicio de UEA. La temo de la antaŭkongreso estos "Esperanta kaj skota kulturoj". Prelegos i.a. William Auld (al kiu ni cetere dankas la prizorgon de ĉi tiu kontribuaĵo al la revuo), Marjorie Boulton kaj Albert Goodheir. Kiel atendeble, de Stirlingo iros karavano al Rejkjaviko, ĝustatempe por ĉeesti la inaŭguron de la 62a UK, en kies Dua Bulteno la kongresanoj trovos ĉiujn aliajn detalojn pri la Antaŭkongreso, okazonta inter la homoj, kiujn prezentas la sekva teksto:

ESTAS DISKUTEBLE, ĉu la skotoj devus senti sin flatitaj per la ĝeneraligoj kaj duonveroj teksitaj ĉirkaŭ ili; sendube, kiel kutime kiam temas pri tiaj prijuĝoj, tiu teksaĵo grandparte baziĝas sur nesciado kaj iluzioj. La skota popolo enkorpiĝas tian variecon, kian oni atendus ĉe nacio deveninta de riĉa etna miksaĵo el piktoj, keltoj, britonoj, praangloj kaj vikingoj, kun kelkaj italoj, poloj kaj aliaj el multe pli postaj enmigradoj.

Tamen multaj skotoj efektive posedas iujn komunajn sintenojn kaj karakterizojn, ekzemple malfalsan interesigon pri la vasta mondo. Plej efike demonstros

tion la konsiderinda nombro de homoj skotdevenaj, kiuj loĝas en aliaj mondpartoj. Tiun nombron oni taksas inter 25 kaj 40 milionoj; krome troviĝas en eksterlando multaj miloj da skotoj denaskaj.

Taksado pri la skotoj devas ankaŭ fronti la akuzon, ke ili estas sekto kontraŭĝoje kalvinisma, "nacio de seriozemuloj" laŭ la angla poeto Wordsworth. Vere, la skota formo de kalvinismo konsiderinde influis al la skota vivmaniero — ne laste, laŭ la opinio de kelkaj, al la leĝoj, kiuj koncernas la vendadon de alkoholaĵoj — sed tiu religio allogis ne pro sia malĝoja kaj deprima doktrino, sed pro tiuj elementoj, kiuj

proponis demokratecan specon de adorado kune kun individua sendependeco kaj memrespondeco. Pli karakterizas skotojn bonhumoro kaj emo al gaja societo; oni povus eble eĉ diri, ke iom da kalvinismo ofte necesas por moderigi ilin.

Homoj vere konantaj la skotojn konsentas, ke multaj el ili estas plenkoraj romantikuloj; sed ili nek malkaŝas siajn emociojn, nek bonvenigas publikajn elmont-radojn de sentimento flanke de aliaj.

La demokratia tradicio en Skotlando estas samtempe forta kaj daŭra, kaj etendiĝas longe tra la skota historio. Ekde la plej fruaj epokoj, skotajn monarkojn oni nomis "Reĝo de la Skotoj" aŭ "Reĝino de la Skotoj", neniam Reĝo aŭ Reĝino "de Skotlando". Tiu nuanco implicas, ke la monarko regis grandparte laŭ konsento de la popolo.

Aliflanke, malgraŭ la fakto, ke multaj skotoj havas vidpunkton radikalan, ilian konduton nepre moderigas forta vejno de praktika sagaco. La skotoj komprenas pli bone ol la plejmultaj homoj la arton agi laŭ la eblecoj, kaj tre malofte alprenas starpunkton ekstremisman, el kiu neeblus kun digno eliri. Tio certgrade klarigas ankaŭ la mokeman satiran tonon de tre multe da humuro skota, kiun oni uzas kiel ŝirmilon kontraŭ la ebleco lasi sin pikebla pro montrado de troa emocio. Jen unu ekzemplo: antaŭ tre longe, en 1545, armeon sendis la angla reĝo Henriko la 8a, kiu ruinigis la urbojn Leith kaj Edinburgo, mortigante centojn da senkulpuloj, nur pro tio, ke Jakobo la 5a, reĝo de la skotoj, rifuzis konsenti pri geedziĝa aranĝo, kiu destinus lian infaninon, Marian, al la filo de Henriko, Edvardo la 6a. Elstare maltroige, la skotoj ankoraŭ hodiaŭ nomas tiun okazaĵon "La Kruda Amindumo". Do la humuro skota estas tre ofte seka kaj intelekta, kaj preferas komenti pri la socio aŭ la politiko, sed ekzistas ankaŭ vere bonega speco

frenezeca, kion volonte konfirmus ĉiu, kiu konas Glasgovon.

Neniu honesta portreto de Skotlando rajtas ignori la fakton, ke restas solvendaj pluraj sociaj problemoj; tiuj estas aparte premantaj en la centra-okcidenta regiono, kiu spertis grandegan malutilon dum la jaroj krizaj kaj ekonomie malprosperaj post la unua mondmilito. Malgraŭ tio, la onidiroj pri "Ruĝa Klajdbordo"* kaj la domaraĉoj kaj violento de "urbo ne malnobla" (kiel oni foje nomas Glasgovon) estas tre troigitaj, kaj ĉiuokaze la domaraĉoj aktuale estas rapide forigitaj per vasta programo de rekonstruado. Krom tio, la grandega plimulto el la glasgovanoj estas ne nur laborema kaj leĝobea, sed ĝi ankaŭ prave ĝuas sian reputacion de popolo plej amikeca kaj gastama en la mondo.



Vi povas helpi

L-EWWEL KORS FL-ESPERANTO — jen la iom mistera titolo de la lasta lernolibro pri la Internacia Lingvo aperigita kunlabore kun UEA. Temas pri lernolibro en la malta verkita de Karmenu Mallia, prezidanto de Malta Esperanto-Societo, kaj presita en Svislando de Johan Lutz.

Kiel UEA eniris en ĉi tian belan kunlaborekzemplan? Simple — ĝi pagis la fakturon. Temas pri 820 svisaj frankoj. Kompreneble, tiel malalta fakturo ŝuldiĝas al la aparte favoraj kondiĉoj en kiuj la libro estis produktita.

Ĉu vi ŝatus igi pli internacia tiun ĉi internacian kunlaboron helpe al maltaj esperantistoj? Se jes, helpu replenigi la nun senespere malplenan kason de la Fondaĵo Azio-Afriko, el kiu venis la mono por *L-Ewwel Kors Fl-Esperanto*. Dankon!

La ĝeneralan amikecon de la skotoj alte taksas ne nur vizitantoj, sed ankaŭ firmaoj, kiuj malfermis sian butikon, por tiel diri, en tiu lando. Tion jam faris sufiĉe granda nombro el Eŭropo kaj Usono, kaj tre malmultaj havis kaŭzon bedaŭri tiun decidon.

Resume tamen, novevenintoj en Skotlando eble surpriziĝos, sed plejofte ili konstatos, ke la surprizo estas agrablaj.

Laŭ *Hodiaŭa Skotlando*,
eld. de la skota Centra Informoficejo.

* Klajdo estas rivero, kiu trafluas Glasgovon.

Paŭlo Balkányi 1894-1977

POST LONGA MALSANO, la 25an de februaro 1977, en Budapeŝto forpasis Paŭlo Balkányi, honora membro de UEA, unu el la plej elstaraj personecoj en la hungara Esperanto-movado dum la lastaj sesdek jaroj. La kremacia solenaĵo okazis la 17an de marto en Budapeŝto.

Balkányi naskiĝis la 11an de marto 1894. Li eklernis la Internacian Lingvon en 1909 kaj rapide fariĝis unu el la plej fervoraj propagandistoj de Esperanto, por resti tia preskaŭ sep plenajn jardekojn. Jam en 1919 li fariĝis delegito, kaj en 1922 ĉefdelegito de UEA, funkcioj kiujn li modele plenumis dum pluraj jardekoj. Al la nomo de Balkányi oni en Hungario ligas la unuan Esperanto-ekspozicion en lernejo, okazintan jam en 1913. Kiel profesia banka kaj komerca funkciulo, Balkányi iniciatis multajn aplikojn de la Internacia Lingvo en tiuj medioj. Al lia nomo ligiĝas sennombraj prelegoj pri Esperanto, kursoj, ekspozicioj, amasego da informaj artikoloj, grandega korespondado kaj enorma kvanto de ĉiaspeca praktika laboro movada, inkluzive la organizon de forta kaj modela informa fako, kiu rezultigis centojn da artikoloj kaj novaĵoj pri Esperanto en la hungara gazetaro.



Ĝenerale oni konsideras Balkányi la ĉefa aktivulo en la hungara Esperanto-movado inter la du mondmilitoj. Krome, al Balkányi iras la ĉefaj meritoj pro la revigligo de la Movado en Hungario post la Dua mondmilito. Kvankam li foje verkis kelkajn noveletojn, Balkányi ne postlasis proprajn librokvantojn. Li apartenas al tiu elito movada, kiu sian famon gajnis unuavice per pena organiza vojo kaj ne per furoro de siaj beletraĵoj. Tamen, Balkányi estis pli ol intime ligita al la beletraj rondoj de *Literatura mondo*, por kiu li elektis la nomon (laŭ Kalocsay). Cetere, la Movado ŝuldas al Balkányi i.a. la lanĉon de la nomo Kalocsay, kies unuan libron, *Mondo kaj koro*, eldonis ĝuste Balkányi en 1921. Li estis ĉefkunlaboranto de la unua eldono de *Enciklopedio de Esperanto* kaj ĝis siaj lastaj tagoj ludis la saman rolon en *Hungara vivo*.

INICIATOJ:

Lingvo por la aero

ONI NE TROVAS alian vivosferon en kiu tiel plene regas unu nacia lingvo, kiel la angla en la internacia aertrafiko. Ni en la Movado bone konscias pri la lingva hegemonio sur tiu kampo. Tamen, ni ofte emas troblovi la lingvan komponanton de ĉiam pli kaj pli multaj aviadilaj akcidentoj. En la momento kiam ni skribas ĉi tion, tra la mondo diskoniĝas la terurigaj detaloj pri la plej granda katastrofo en la historio de la aviado, tiu en Tenerife, en Kanariaj Insuloj, la 27an de marto ĉi-jare. Eble montriĝos, ke la pilotoj de la nederlanda kaj usona jetoj-gigantoj miskomprenis la instrukciojn de la kontrolo. Eble esperantistoj denove jodlos, ke la lingva problemo kaŭzis la katastrofon, kiu forkonsumis pli ol 500 homajn vivojn. En similaj kazoj ni emas preteratenti, ke plena rego de la angla estas tiel esenca por pilotoj, kiel la pilotado mem. Ĉar ni scias, ke por piloti necesas majstri tiun arton, ni ekkonsciu, ke oni samsevere postulas bonan regon de la angla en tiu fako. Ni ne volas aserti, ke la Movado lasu flanken la lingvan problemon

en la internacia aertrafiko. Male. Ni ja okupiĝu pri ĝi plenfervore, sed ni trovu la ĝustajn argumentojn, serĉu la punkton kie eblas efike ekmordi la demandon, tiel ke ni estu konvinkaj ankaŭ por la nezamenhofa parto de la homaro.

Bonajn paŝojn ĉi-rilate oni faras lastatempe en Kanado, kie la enlanda aertrafiko, pro sia unulingveco — angla —, fariĝis kvazaŭ atenco al la leĝe garantiita egalrajteco de la du oficialaj lingvoj — angla kaj franca. Unue, en julio pasintjare, la 18a Kongreso de la Kanada Esperanto-Asocio saĝe rezoluciis pri la lingva problemo en la aertrafiko ĝenerale, kun akcento je la kanada kazo. Kaj, oni ne restis ĉe la rezolucio — kio ja estas ofta kazo en la Movado —, oni pluagas. Lastatempe venis al ni tuta studo de aeronautika ingeniero Paŭlo Puvrez el Toronto, kiu detale kaj kun atendebla faka kono pri-skribas la kanadan kazon kaj proponas, ke ankaŭ aliaj landaj asocioj kaj precipe la internaciaj E-organizaĵoj kiel UEA kaj SAT dediĉu atenton al la problemo. Ing. Puvrez proponas, interalie, ke la 62a UK en Rejkjaviko akceptu rezolucion pri la lingva demando en la internacia aertrafiko. Ni kun atento sekvos la evoluon de la iniciato kaj esperas, ke ni povos raportiri pri novaĵoj ĉi-rilate.

Levi la nivelon de la lingvokono

Kompreneble mi konscias, ke la personaj deziroj de mi, maljuna homo, ne estas aparte gravaj. Al ĉio oni ja devas rilati el ĝenerala vidpunkto. La gustoj de la esperantistoj estas tre diversaj, tamen unu el la ĉefaj celoj de nia centro estu veki en la anaro seriozan sintenon al Esperanto kaj **levi la nivelon** de la lingvokono — tion ja postulas la nuntempo.

Hilda Dresen, Soveta Unio

Pri la finaĵoj "-ia" kaj "-a"

Oni tute ne povas, laŭ la propono de H. Seppik (en *Esperanto* n-ro 852) simple kaj ĉiu-okaze anstataŭigi "-ia" per "-a". Ekzemple, "hispana filmo" estas filmo hispan-lingva pri iu ajn temo, supozeble farita en Hispanio; male "Hispania filmo" estas filmo eble historia (aŭ kultura, aŭ folklora, aŭ alia) **pri Hispanio**. Same, "franca kulturo" estas kulturo havanta la tipajn kvalitojn kaj karakteron de francoj, de la francoj; male, "Francia Esperanto-Asocio" estas nenio alia ol Esperanto-asocio **en Francio**, kaj kies membroj povas esti ne nur francoj sed ankaŭ ne-francoj.

Simile, "filozofa prelego" ne nepre estas prelego de iu filozofo (aŭ profesoro pri filozofio); povas esti, ke iu kuracisto aŭ juristo aŭ inĝeniero okaze pritraktas temon "laŭ la maniero de filozofo" aŭ kiu enhavas certajn ideojn filozofiajn.

Konklude: En ĉiu okazo, necesas uzi la ĝustan finaĵon "-ia" aŭ "-a", laŭ la senco esprimota de la skribanto aŭ prolanto.

Germaine Kirtz, Francio

Kion faru komencantoj?

Kelkaj personoj, membroj de UEA, diris al mi, ke ili ne sentas sin kompetentaj esti membroj, ĉar nia oficiala organo, *Esperanto*, ne enhavas sekcion por komencantoj, eĉ ne por mezgradaj esperantistoj. Ili simple ne povas kompreni la altgradan, klasikan Esperanton en tiu periodaĵo! Pro tio ili diris al mi, ke ili ne sendos kotizojn por daŭrigi la membrecon en UEA. Ŝajnas al mi, ke eble ili pravas. Foje estis gazeto *La Praktiko*, kiu celis al tiuj, kiuj aŭ ne emis aŭ ne povis progresi helpe de *Esperanto*. Ĉu pro tio ni perdu membrojn? Ĉu oni ne povas trovi solvon por tiuj fervoraj esperantistoj?

Roan Orloff-Stone, Usono

Pledo por 112-paĝa revuo

Mi opinias, ke iom post iom la revuo devus kreski laŭamplekse tiel, ke post ia, ne tro malproksima tempo, ĝi fariĝu dika 112-paĝa, impona, reprezenta **magazino** ĉiumonata, kiu estus ne nur konciza primovada informilo, sed samtempe, kaj ĉefe, ankaŭ dika **literatura** revuo kaj **popularscienca** periodaĵo. Ĉar estas iom

ĉagrene vidi, ke **laŭamplekse** la **centra** organo de la Movado ne povas konkurenci ekzemple eĉ kun la **nurlanda Hungara Vivo**. Mi scias, ke la plej gravan rolon ĉi tie ludas demandoj ĉefe ekonomiaj. Tamen... Preskaŭ ĉiuj okcidentaj ĵurnaloj "vivtenas" sin eĉ ne tiom per abonoj, kiom per pagitaj reklamoj. Kaj tio, eble, povus esti ankaŭ nia vojo...

Karolo Piĉ, Ĉeĥoslovakio

Komplimento

Post ricevo de la februara numero de *Esperanto* mi volas diri, ke mi tre ŝatas ĝian bonan aspekton, tipografie kaj enhave. Estante malnova — kaj tre maljuna — redaktoro de semajna gazeto kaj ankaŭ eldonanto de libroj, mi juĝas pri la tekniko de periodaĵoj. Mi volas diri, ke nia organo nun ŝajne ricevis bonan stilon.

Kvankam mi ne plu estas aktiva, mi tamen legas kun intereso pri la laboro en la CO kaj mi esperas, ke vi nun venis sur la rektan kaj ĝustan vojon. Malfeliĉe la vojo de UEA estis tre kurba (kiel ankaŭ la Esperanta movado).

Henning Halldor, Svedio

Ataka laŭdo

Ricevinte la revuon *Esperanto* 1/77, ni sentas la bezonon kapti skribmaŝinon por informi vin pri nia plena subteno al la ideoj esprimitaj de s-ro Tibor Ujlaky-Nagy (Leterkesto, paĝo 11). Efektive la litero *â* ne estas Esperanta kaj ni ne scias kiel prononci ĝin. Oni devas ĉiam supozi ke esperantistoj konas nur la Esperantan literaron, alikaze oni povus trankvile uzi plej diversajn literojn ankaŭ nelatinajn (ekzemple: *ç, ø, å, ö* ktp.). "Târgoviște" estu verŝajne "Tergoviște". Aliflanke s-ro Ujlaky-Nagy mem uzas ne-Esperantan literon. Kio estas tiu stranga kornforma "y"? Ni esperas ke ni ne devos lerni la hungaran lingvon por scii ĉu la aŭtoro de la letero nomiĝas Ujlaki-Nagi, Ujloti-Nodi, Ujleki-Negi, ktp.

Ĝenerale ni volas substreki la gravecon de pure Esperanta reskribado de nomoj kaj origine latinliteraj kaj origine nelatinliteraj. Se oni sekvus la praktikon de s-ro Ujlaky-Nagy, oni devus allasi rusojn skribi siajn nomojn per cirilaj literoj, arabojn per arabaj literoj, ktp.

N. Vesela/R. Korseti, Italio

Por efika informado

Por vere efika informado oni bezonas konkretajn faktojn pri la signifo kaj rezultoj de la Internacia Lingvo. Tiajn faktojn liveras ekz. listo de universitatoj kaj altlernejoj, kie oni lernadas la lingvon, nombro de Esperantaj gazetoj ktp. Antaŭ ĉ. dek jaroj UEA aperigis detalan liston de la landoj kaj urboj, kie situas Esperanto- aŭ Zamenhof-stratoj aŭ placoj. Post tio, tamen, la nombro de tiaj multege grandiĝis. Sole en *Esperanto* 1/77 oni notas du tiajn urbojn, en Bolivio kaj Soveta Unio. Tre grave estus ricevi tute ĝisdatan novan liston. Nun mi deziras demandi: Ĉu inter la legantoj de ĉi tiu revuo troviĝus iu, kiu havus tempon kompili novan statistikon pri la universitatoj, altlernejoj kaj E-stratoj?

N. Kavenius, Finnlando

Leteroj el lafolando



"Nia esploro ĉe la Londona vojaĝagentejo, ĉu la deĵoranto povos liveri al ni konsilojn pri vojplano, estis sensukcesa: la mirigita komizo rimarkigis, ke 'mi iam ricevis mendon por bileto al la Norda Poluso, sed neniam oni petis bileton al Islando.' "

(Tweedie, 1882)



"Ĉiuj vojaĝoj kaj transportadoj de varoj kaj la poŝto tra la interno de Islando estas per ĉevalo. Ne ekzistas eĉ unu ŝoseo, rada veturilo, vapormotoro, poŝtoŝtelo, doganejo, policisto, fortikaĵo, soldato aŭ advokato en la tuta lando. Varojn, sekigitajn fiŝojn, kaj multvaloraĵojn oni lasas ekstere, negardataj, sen risko, ĉar ŝtelado estas nekonata en Islando."

(Miles, 1854)



"... ombrelo estus tute perfekte senutila, ĉar kutime akompanas la pluvon multe da vento, kaj, ĉar oni ofte devas rajdi tre rapide, estas facile imagi, ke restas tute ekster konsidero suprenteni ĝin."

(Pfeiffer, 1845)



"En ĉiuj fakoj de la literaturo, inter la islandanoj ekzistas forta emo al kritika severo, kaj ĉe teologiaj verkoj speciale, tiu severeco de tempo al tempo prenas tre rigoran formon. Kurioza tia ekzemplo okazis antaŭ cent jaroj, kiam malfeliĉulo estis pune publike vipita pro eraroj, kiujn li faris en traduko de la Libro de Genezo."

(Mackenzie, 1810)



"La sola publika malliberejo en la insulo, tiu en Rejkjaviko, estis konstruita antaŭ kvindek jaroj. Pro eraro, ne tiom kontraŭnatura en lando kiel Islando, tiu konstruaĵo estiĝis multe pli komforta ol la ordinaj loĝejoj de la indiĝenoj, tiel ke, se ne temus pri senigo je libereco, la islandano eble estus tute kontenta ŝanĝi la propran loĝejon kontraŭ tiu loko, kies efektiva komforto estas apenaŭ malpli granda, kaj kie li evitas multajn malbonojn, ligitajn al lia kutima maniero de vivado... Kiam ni vizitis Islandon, estis ses homoj enkarcerigitaj en tiu loko..."

(Mackenzie, 1810)



"Neniam estis pli ol unu malliberejo en la insulo, kaj tiu estis uzata kiel almozdomo. Eĉ tiam, ĝi estis preskaŭ senutila, kaj pli-malpli ĉiam sen okupanto; finfine, por iel utiligi ĝin, oni konvertis ĝin en loĝejon por la guberniestro..."

(Miles, 1854)



"Skr estas nacia manĝaĵo... kaj ĝi estas nenio alia ol kazeigita ŝaflakto, simila al la germana 'dicke-milch', manĝata kun sukero, al kio oni povas aldoni kremon, kiel lukson. Ĉar ĝi estis iom acida, ni unue klopodis eviti ĝin, timante postajn konsekvencojn, sed tio ne necesis. Ĝi vere estas ege bongusta, kaj la indiĝenoj manĝas ĝin grandkvante."

(Tweedie, 1882)



"Mi boligis pecon da viando por la vespermanĝo en unu el la [varmaj] fontoj kaj dum la kulinara operacio, mi iris al lageto en la rivereto, kiu fluas el la Granda Gejsero, kaj ĝuis plej rave varman banon. Ĝi estis tute senpaga — neniu kosto por varmigo de la akvo."

(Miles, 1854)



"Ekzistas aparta groto, ĉirkaŭ mejlon longa, unutagan vojaĝon norde de Thingvellir, kiun la islandanoj nomas 'Surtshellir', aŭ, en nia lingvo, 'Groto de Satano'. Neniu islanda gvidanto pretas eniri ĝin. Kiam vojaĝantoj volas esplori ĝin, ili devas iri solaj. Oni kredas, ke ĝi estas loĝejo de lia



Satana Moŝto; kaj kiam li venos el la tero por fajrigi la tutan mondon, li venos el tiu ĉi groto. Mi demandas min, ĉu li neniam venas al la gejseroj por foje kuiri la vespermanĝon..."

(Miles, 1854)



"Mi volonte retiriĝus por prepari mian vespermanĝon, kaj skribi kelkajn vortojn en mian taglibron, antaŭ ol ripozi; sed tio ne eblis; ĉiuj loĝantoj de la loko enfluis amase por rigardi min, kaj mi estis tuj ĉirkaŭita de junuloj kaj maljunuloj, kiuj baris min je ĉiuj flankoj. Kvankam ilia rigardado estis malagrabla, mi devis submetiĝi al ĝi, ĉar ne eblis forigi la homamason sen kaŭzi grandan ofendon; mi do malpakis mian valizeton kaj publike faris aranĝojn por prepari mian kafon. Tiam miaj spektantoj metis la kapojn kunen, kaj kiam mi bruligis mian alkohollampon, ŝajnis perditaj en miro, sekvante ĉiun movon per la okuloj... Kiam finiĝis mia modesta



vespermanĝo, mi trovis, ke ilia persisto estis neniel velkinta, kaj obstine decidante provi ĝin, mi malfermis mian taglibron kaj komencis skribi. Dum kelkaj momentoj, ili silente rigardis min, ĝis ili subite ekkriis 'Ŝi skribas, Ŝi skribas.' ” (Pfeiffer, 1845)

 ”Kapitano Laborde prenis min kaŝeme je la brako, kaj kondukis min flanken al la fendo en la lafo, kaj svingante al ĝi la manon, petis la honoron prezenti al mi islandan arbon. Kaj jen ĝi staris, verda kaj prosperanta, sed de tiaj dimensioj, ke, se mi ne estus konscia troviĝi en Islando, mi eble tiel malrespekte traktus ĝin, ke mi nomus ĝin nur arbeto, arbusto, aŭ dornotigo. Mi nun konstatas, ke mi estis iom riskema esprimante opinion, ke la arbusto, alta eble kvin futojn, kiun mi vidis en la ĝardeno de la guberniestro, estas verŝajne la plej granda arbo en Islando. Nun, jen specimeno, soranta sola en la majesto de abunda naturo, almenaŭ ses futojn vertikalen; kaj se la diversaj tordiĝoj kaj kurbiĝoj kiuj ornamis la trunkon estus rektigitaj, mi ne dubas, ke ĝi estus naŭ aŭ dek colojn pli alta. Mi forprenis mian ĉapelon, kaj faris profundan riverencon al ĝi.” (Miles, 1854)

 ”La interno de Islando, entute, kiu etendiĝas eble ne malpli ol kvardek mil kvadratajn mejlojn, estas teda, malgastama dezerto, komplete sen homa loĝejo, kaj preskaŭ tute nekonata de la indigenoj mem.” (Mackenzie, 1810)

 ”Ni ŝajne alproksimiĝis al la regiono de fajro. Sulfuraj fumoj salutis niajn nazojn; la vetero heliĝis iomete, kaj subite, tuj antaŭ ni, vastis osceda kratero. Kia terura abismo! Vere, ĝi aspektis kiel la infero mem. La tradiciaj fajro kaj sulfuro! Malhela, serpenta fumo, flava sulfuro kaj ruĝaj cindroj, aperis sur ĉiuj flankoj... Nia progreso estis nun plena je granda danĝero. Maldekstre troviĝis la norda flanko de la monto, kaj en longa distanco ĝi formis vertikalan muron, kiu abruptis pli ol mil futojn malsupren. Granda ŝtono, ĵetita suben, neniam resendis ehon. La krateroj estis ĉe nia dekstra flanko, kaj inter tiuj kaj la klifo ĉe nia maldekstro, ni trede sekvis malvastan spinon de sablo, ne pli larĝan ol ordinara piedvoĵeto... La danĝerojn kaj hororojn de la sceno grande plivasti-

gis la nuboj kaj malvarma vento, kiuj supren venis de nia maldekstro, kaj la fumo kaj sulfura odoraĉo, kiuj leviĝis el la krateroj ĉe nia dekstro. Ni riskis je unu momento fali laŭ la vertikala flanko de la monto suben, kaj je la posta, englutiĝi en la brulantan krateron.”

(Miles, 1854)

 ”... kaj ĉi tie ni estis devigataj lasi niajn ĉevalojn. La islandanoj havas inĝenian manieron ligi la ĉevalojn por ke ili ne vagu for. Ili ligas ĉiujn ĉevalojn en cirklon, ŝnurante la kapon de unu al la vosto de la posta, kaj venigante la kapon de la unua ĝis la vosto de la lasta. Se ili elektas fortroti ili povas, sed, kiel eta Joĉjo sur sia lulĉevalo, ili povas galopi la tutan tagon en senfina cirklo, sen multe progresi.” (Miles, 1854)

 ”Aŭdante grandan muĝadon maldekstre, mi turnis min flanken por eltrovi la kaŭzon; kaj jen vaporfonto, aŭ pli ĝuste, ŝpruco de vaporo, kiu rapidis el la monto kun laŭta kaj konstanta muĝego. La bruo kaj eskapo de vaporo estis senĉesa... Sendube, se tio estus en fabrikada lando, domo estus konstruita super tiu ĉi natura vaporfonto, motoro muntita, kaj, per kaptado de la vaporo en cilindron, ĝi povus fari bonajn servojn, kaj ĉio tute sen brulaĵo, fajro aŭ akvo, kaj poreterne.” (Miles, 1854)

 ”... kaj nun ekzistas poŝto dum naŭ monatoj de la jaro (la boatoj funkcias de tempo al tempo dum la vintro), leteroj estas portataj ĉevale de la ĉefurbo transen ĝis Akureyri ĉiun kvaran semajnon.” (Tweedie, 1882)

 ”Estas certe multaj malfacilaĵoj venkendaĵoj por plenumi vojaĝojn en tiuj foraj regionoj ĝis feliĉa kompletigo; sed mi ne estis timigebla, kaj en la mezo de miaj plej grandaj danĝeroj kaj perturboj, mi ne pentis eĉ dum unu momento pro mia entrepreno, kaj neniam estus forlasinta ĝin pro iu ajn kialo.” (Pfeiffer, 1854)

KAJ KIUJ ESTIS tiuj ĉi saĝaj observantoj kaj konsilantoj? Nu, en 1810, Sir George Mackenzie, skoto, iris al Islando por studi, interalie, la geologion; en 1845 s-ino Ida Pfeiffer, aŭstrino, vojaĝis tien ”Ĉar ĝi estas tiom nekonata de turistoj, ke ĝi devos esti unika sperto”; en 1854 vizitis ĝin la usona verkisto, Pliny Miles, ankaŭ turiste. En sia libro li, interalie, mal-konsentis kun multaj rimarkoj kaj opinioj de s-ino Pfeiffer. En 1882, anglino Ethel Tweedie vizitis Islandon ĉar ŝi estis juna, serĉis aventurojn, kaj ne volis iri al la kutimaj turistaj lokoj en Eŭropo.

Fina noto: eĉ se vi ne antaŭvidas **precize** la samajn problemojn kaj spertojn kiujn frontis niaj antaŭuloj, iliajn problemojn memoru kiam perdiĝos via valizo, kiam starvicoj en la kongresejo longos, aŭ kiam vi perdos vian ekskursobileton...

Kompilis
Julie Tonkin

Lerte rakontita

Recenzas Alec Venture (Britio):

Homa animo, de Despina Patrinu. Ateno: la aŭtorino, 1976. 63p. Ilus. 21cm.

Ĉar la greka Esperanto-movado neniam estis tre forta elemento en la internacia, ekzistas en la Internacia Lingvo nek tradukoj el la moderna greka lingvo, nek originalaj literaturaĵoj de grekaj aŭtoroj. Tial oni bonvenigu tiun ĉi verkon, enhavantan originalajn rakontojn kaj rakontojn unue verkitajn en la greka lingvo kaj poste tradukitajn de la aŭtorino mem, kiu lernis Esperanton nur lastatempe.

Despina Patrinu aperigis romanojn jam en la jaroj 1953 kaj 1955, kaj rakontaron en la jaro 1973. Partoj de la nuna volumo estas verŝajne ĉerpitaj el la verko de 1973, kies titolo "Unu dio kaj unu homo" estas ankaŭ la titolo de la lasta rakonto en *Homa animo*.

La starpunkton de la aŭtorino oni povus trafe resumi per la jenaj citaĵoj el la rakonto "Survoje al Katmantu": "Ĉiu homo estas unu tuta mondo, aparta, kiun neniu alia povas kompreni" . . . "Ni naskiĝas solaj kaj mortas solaj, trapasante malamikan spacon, loĝatan de nekonataj personoj."

Estas domaĝe, ke la plezuron de la legado de verko interesa kaj lerte rakontita malpliigas interalie la tre ofta kaj nenecesa uzado de **unu** kiel nedifina artikolo kaj la manko de multaj subjektaj pronomoj.

Prezo: 7,20 (por Nederlando 7,49) gld., plus 10% sendokostoj.

Spirito uzurpa

Recenzas Probal Daŝgupto (Hinda Unio):

Filigranoj el lumo, de Divaldo P. Franco. El la portugala trad. Benedicto Silva. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1976. 154p. 18cm.

En tiu ĉi tradukaro enestas, krom iom da preseraroj, ankaŭ malĝustaĵoj lingvaj: *ensorĉ* (anstataŭ **sorĉ**, p.31 k.a.), *ekbruli* (**ekbruligi**, p.69), *gracila* (**gracia**, p.80, sed korekte **gracia**, p.122); *orfaneco* (**orfeco**, p.100, sed korekte **orfoj**, p.101), *oferi* (**proponi**, p.55), malĝataĵoj sintaksaj: *ne alveninte mia amato* (p.85) kaj *mortinte la maharaĝo* (p.131), pleonasmo: *ne estante amata* (**ne amate**, p.97) kaj aliaj makuloj iom surprizaj meze de la ĝenerale bonkvalita lingvaĵo.

Malfacilas objekte komenti pri la poemoj mem.

Mi hipotezas, ke Robindronath Tagor — same petolema mortinte, kiel naskiĝinte — cedis la rajton, dikti

sianome poemojn per medioj, al mistikema spirito persiste petadinta tiun rajton — spirito de okcidenta, eble amerika "deveno", kiu eĉ ne scipovas elegante uzurpi. Ne urdue oni preĝas en sika gurdvaro (134). Hinduoj, kia estis Robindronath, ne estas entombigataj (89), sed kremaciĝas. "Bengala dancistino" ne komprenas "hindostane" (26), precipe en "soleco kaj doloro". "Udaipur" povas ŝajni "lontana regiono" (52) al okcidentano; multe pli fremdaj al la vera Robindronath estas la "lazo"j por "jungi, jungi la beston de la despera koro" (44) kaj la "violo"j (39), la "Nekaŭzita Kaŭzo" (27) kaj la "civilizacio religia sed sen Dio" (31), la timo pri punonta Dio (168) kaj la elaĉeto de pekuloj (93), la malŝato de pasio (80) kaj de politiko (124) kaj la obsedo pri virgul(in)oj (149 k.a.), kaj super ĉio la kompletaj unutono kaj senhumuro (1-154).

Prezo: 11,10 (por Nederlando 11,54) gld., plus 10% sendokostoj.

Nekohera, sed interesa

Recenzas Wim Jansen (Nederlando):

Lingua e politica; Imperialismi identità nazionali e politiche linguistiche in Asia Africa America Latina (Lingvo kaj politiko; Imperiismoj, lingvaj identecoj kaj lingvaj politikoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko), Diversaj aŭtoroj; Redaktis R. Corsetti. Roma: Officina Edizioni, 1976. 276p. 21cm.

Kiel recenzi libron, kiu baziĝas sur seminario pri lingvoplanado en Romo (1975) kaj kiu, entenante la prelegojn de tiu aranĝo, plus kelkajn postajn kontribuojn, prezentas al la leganto buntan faskon de dekduo da konkretaj lingvosituacioj, ĉiuj traktitaj el specialista vidpunkto?

La kompilinto de la verko mem liveras la enkondukan artikolon, en kiu li multe penas difini la nocion "lingvo" — kiel cetere same okazas aliloke en la libro —, bedaŭrinde sen klopodo difini "politikon". Prave Corsetti difinas principe egalrangaj ĉiujn variaĵojn de "oficiala" lingvo, t.e. ĉiujn ĝiajn geografiajn kaj sociajn esprimformojn, sed li mem vidigas kiom malfacila tio praktike montriĝas el metodologia vidpunkto, levante superfluan diskuton pri la lingva statuso de la piemonta en la norda Italio (p.14).

En siaj konsideroj pri kiel elekti oficialan ŝtatan lingvon el inter multaj disponeblaj variaĵoj, Corsetti tro senĝene simpligas kaj ne malofte transpaŝas la limojn de scienca objektiveco, kie "politiko" fariĝas "politika prefero".

En sia kontribuo "Tradicio kaj renovigo en la lingvoj de novaj aziaj landoj" prof. Bausani proponas siavice enkondukstilan artikolon de ĝenerala valoro, en kiu li traktas precipe la ĝisdatigon de la leksikonoj de pluraj aziaj lingvoj. Giovanni Oman, en "Historiaj evoluoj kaj lingvaj problemoj en la arabaj landoj", donas al ni bonan historian bildon pri tiu regiono, bedaŭrinde sen mencii la internacipolitikajn aspektojn de la araba.

Interese, ke je 7-paĝa distanco aperas du apenaŭ akordigeblaj eldiroj pri la iraka politiko rilate la kurdojn: "... la lasta kurda milito nek kompromitis nek modifis la (tre favoran) lingvo- kaj kultur-politikon de la iraka registaro, malgraŭ enormaj konsekvencoj sur la politika kaj humana kampoj..." (Pennacchietti, p. 65), kaj aliflanke "...la proponita aŭtonomio estas ĉiel nesufiĉa..." kaj "... la kurdoj, kiuj demetis la armilojn, estas portataj en koncentrejojn..." (Ismet Cherif Vanly, p. 72). Kiu pravas?

La lasta kontribuinto, Cardona, en sia "Lingvistiko kaj politiko", disvolvas al ni la kutiman postsaŭsuran* (kaj ĉefe usonan) dividon de "lingvo" (plej granda rekoncbla unuo) en "dialektojn" (pli limigitaj unuoj, sed sen hierarkia kromsignifo), fine en "idialektojn" (individa lingvaĵo), kontraste al la socilingvistiko, kiu iras de la tuto de lingvaj iloj kaj eventoj al pli limigitaj "situacioj" aŭ "modeloj" (regiona, klasa, profesia lingvaĵo, k.s.) kaj fine al la individua lingva evento. La aŭtoro ne solvas, ke ambaŭ alfrontoj al la fenomeno "lingvo" ŝarĝas nin per senfino da variaĵoj (ĉu idialektoj, ĉu situacioj), kies sciencan priskribeblon oni povas pridubi.

Cetere, oni trovas en la libro kontribuojn pri centrazia Sovet-Unio, Pakistano, Hinda Unio, Malajzio kaj Indonezio, la svahila, nove sendependaj ŝtatoj en Afriko, la amazona regiono kaj la andaj ŝtatoj. Amaso da biografiaj notoj kaj statistikaĵoj kompletigas ĉi tiun iom nekoheran sed interesan artikolkolekton.

La rilato inter ĉio ĉi kaj Esperanto? Corsetti dediĉas magran duonpaĝon al tio. Dubinde, ĉu tio sufiĉus por veki reciprokajn interesojn inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj.

Prezo: 15,90 (por Nederlando 16,54) gld., plus sendokostoj 10%.

* Temas pri la fama lingvisto René de Saussure (1872-1943).

Tekstoj meritigas pli

Recenzas Lajos Lesznai (Hungario):

Dum la noktoj (kaj aliaj kantoj originalaj), de Margaret Hill, David Hill kaj William Auld. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1976. 70p. Ilus. 21cm.

Ĉe tiu ĉi volumeto ni staras antaŭ la demando: ĉu la kantoj estas bone kanteblaj kaj ĉu ili povas servi kiel propagandiloj por Esperanto dum kulturvesperoj.

Antaŭ ĉio pri la tekstoj. La poemojn verkis — escepte de du — la bone konata poeto William Auld. Pri la eminenteco de la liriko certe ne necesas paroli.

La melodioj estas grandparte originalaj komponaĵoj, sed kelkaj estas popularaj kantoj. En tiu ĉi okazo estas la problemoj: ĉu la melodioj decas al la tekstoj? Certe ne en ĉiu okazo. Oni estus devinta ilin pli zorgeme elekti. Granda parto de la originalaj kantoj ne staras en strofa strukturo, kiel la respektivaj poemoj. Pro tio, kanti ilin estas iom malfacile. La prozodio estas plejparte ĝusta, tamen estas troveblaj tiaj malĝustaĵoj kiel ekz. ge-junuloj (Sablo de l'tempo).

Entute, la tre bonaj tekstoj meritigas pli bonajn melodiojn.

Prezo: 5,10 (por Nederlando 5,30) gld., plus sendokostoj 10%.

Rava sincero de la junaĝo

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):

Rimletoj, de M. Boulton kaj W. Auld. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1976. 93p. 15cm. ISBN 0 9505323 0 4.

"La emociojn mi malfidas / ... instinktojn mi racie bridas." — rondelas Auld al Boulton la 19an de oktobro 1953, kaj ŝi replikas jam la sekvan tagon: "Je emocio kaj racio / Ĉiam restados mia fido. / Mi volas vivi nek en frido / Nek en senbrida histerio."

Simile al la supraj versoj tra 84 rondeloj daŭras la kurioza korespondado inter W. Auld kaj M. Boulton dum proksimume ok monatoj en la jaroj 1953 kaj 1954. Ili ambaŭ estis junaj: ĝuste nur atingontaj sian tridekan jaron. Auld jam havis bone bazitan reputacion en la Esperanta literaturo kiel "kvaropano", kaj tiutempe li laboradis interalie super *La infana raso*, dum Boulton certe ordigis siajn poemojn por la baldaŭ aperonta potenca *Kontralte*. Tiamaniere do estas aparte interese trastudi tiun ĉi ankaŭ forme unikan korespondadon por ĉiu studanto de nia literaturo, ja la 84 rondeloj de la du poetoj ebligas ricevi riĉajn informojn pri la pensoj kaj zorgoj, kiuj tiutempe okupis la du poetojn.

Sed oni ne supozu, ke tiu ĉi kolekto estas alloga legaĵo nur por literaturistoj. Auld kaj Boulton estas personoj intelektaj, kun pensado sufiĉe simila, por ke vera amikeco povu disvolviĝi inter ili, tamen sufiĉe malsimila, por ke ili ne simple regardu la pensojn de la korespondanto. Auld estas karaktero pli juneca, revolucia; li ne volonte akceptas kompromisojn, kaj respektas nur la racion. Male, Boulton montras paciencon al la establiĝintaj valoroj de la socio, kaj entute rilatas al ĉio pli prudente, pli kompreneme. La tono de la rondeloj estas tre varia: kelkaj gaje flirtas, aliaj ombre filozofiumas, sed senescepte el ĉiuj radias la rava sincero kaj senpereco de la junaĝo. Same vasta estas la temaro:



Rondeloj kiel komunikilo: Auld kaj Boulton.

krom grandaj filozofiaj problemoj aperas abunde ĉiutagaj zorgoj (monomanko, ktp.), etaj ĝojoj. La korespondado ne dece **fermiĝas**, kiel tio okazas al zorge preparitaj "literaturaj korespondadoj", sed simple **interrompiĝas** (almenaŭ rondelforme), kiel tio ĝenerale okazas en la reala vivo. Videble neniuj el la korespondantoj okulumis al la "eterneco", sed ili verkis la rondelojn vere unu por la alia.

Jen, agrabla poezia legaĵo por ĉiuj parolantoj de nia lingvo: ĝue legos ĝin eĉ personoj, kiuj ne volonte rompas al si la kapon per digestado de nia komplika moderna liriko. Kaj fermante la volumeton, la recenzanto senvole pensas pri tiu giganto de la Esperanta literaturo, kies *Rimportretoj* verŝajne donis la instigon por komenci tiun ĉi ludeseriozan korespondadon: pri Kálmán Kalocsay.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) gld., plus sendokostoj 10%.

La sesa traduko

Recenzas Walter Francini (Brazilo):

Esperanto programmato (1970), de H. Behrmann. Trad. kaj adaptis por itallingvanoj F. Chiappetti, V. dall'Acqua, M. Lipari kaj C. Minnaja. Milano: FEI, 1974/75. 293p. (4 kajeroj) 20cm. Kun gramofondiskoj aŭ sonkaseto.

Tiu ĉefverko el la instrua literaturo por memlernantoj jam antaŭe aperis en la germana, angla, nederlanda, sveda kaj brazila eldonoj. Ĝia enhavo, en formo de rakontado kun dialogoj, inteligente ekspluatas la allogaĵojn de la esperantista vivo. La lingvo prezentiĝas pere de tipaj frazoj, el kiuj la memlernantoj estas glate kondukataj al la gramatikaĵoj. Taŭgaj ekzercoj riĉigas ĉiun lecionon.

Jen kelkaj rimarkoj, kiuj absolute ne ĝenas la bonegecon de la verko: 1) En la historio de p.250, la diferenco inter **-ata** kaj **-ita** ne estas klara. Ankaŭ la itallingva teksto 10 de p.125 ŝajnas nesufiĉe klara por la lernantoj. 2) En "antaŭ la sankta Petro" (p.238), la artikolo estas nenecesa. 3) En la revizio oni ne korektis kelkajn (malmultajn) erarojn aŭ mankojn, kiuj povas ĝeni la memlernantojn: "Tio estas **facile**"

(p.238); "Argentino" kaj "argentinano", "etiopano" (p.252); "Oskar" (leciono 7) kaj "Oskaro" (leciono 10).

Resume: pro sia eldonaĵo Itala Esperantista Federacio meritas laŭdon: Belaspektaj libroj, diskoj kun tre bona prononco.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 35,40) gld., plus 10% sendokostoj.

Laste aperis...

Epifanio aŭ *Kiel vi volas* (1601), W. Shakespeare (1564-1616). El la angla tradukis W. Auld. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1977. 71p. 20cm. ISBN: 0 905149 02 5. **Prezo:** 9,00 gld.

Hebreo el la geto; De cionismo al hilelismo. Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 5. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1976. 455p. Kolorilus. 22cm. Bind. Dokumentoj (kaj komentarioj) pri la vivo kaj laboro de d-ro Zamenhof, ĉefe en la periodo antaŭ la apero de Esperanto; represo de la tuta broŝuro *Hilelismo* (1901). **Prezo:** 27,00 gld.

Metropoliteno (1933), Vladimir Varankin (1902-1937). Kopenhago: TK, 1977 (2a eldono). 252p. 20cm. ISBN 87 87089 10 6. Originala romano, streĉa kaj belstila; unu el la ĉefverkoj de la Esperanta literaturo. **Prezo:** bind. 32,70; broŝ. 24,00 gld.

Protektu vian vivon kaj vivon de aliaj. Skopje: Makedonia Esperanto-Ligo, 1976. 14p. Ilus. 17cm. Manlibreto pri sango kaj sangodonado. **Prezo:** 2,40 gld.

Role of Esperanto in the School Curriculum, The (La rolo de Esperanto en lerneja programoj), H.S. Chapman. London: British Esperanto Association, 1977. 7p. 22cm. **Prezo:** 0,30 gld.

Sciencaj komunikaĵoj. Div. aŭtoroj. Budapeŝto: Budapeŝta informilo, 1976. 70p. Ilus. 23cm. Dek du studoj pri diverssciencaj temoj (arkeologio, esperantologio, hidraŭliko, medicino, mineralogio, muzikologio ktp.). **Prezo:** 11,70 gld.

Tridek jaroj; Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1976. 42p. Ilus. 21cm. Prezento de la lando (inkluzive de skizo pri la historio de la landa Esperanto-movado), kun statistikaj tabeloj kaj riĉa eksterteksta bildaro. **Prezo:** 1,80 gld.

Turystyczny Słowniczek Polsko-Esperancki, R. kaj A. Grzębowski. Bydgoszcz: Klub Prasy i Książki "Esperanto", 1976. 40p. 14cm. Turista vortareto unudirekta. **Prezo:** 1,80 gld.

Von der Utopie zur Wirklichkeit, A. Baur. La Chaux-de-Fonds/Dudweiler: KCE/SEL, 1976. 23p. 21cm. Germanlingva historieto de planlingvoj. **Prezo:** 0,90 gld.

Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge-Vogtland (1907-1933). Karl-Marx-Stadt: Kulturbund der DDR, 1976. 38p. 21cm. Germanlingva. **Prezo:** 2,40 gld.

DIVERSAĴOJ:

Gratulkartoj. Serio de 8 belformataj, verde presitaj gratulkartoj por diversaj okazoj; kun adekvata blanka koverto. **Prezo:** 9,00 gld.

Insigno 10a. Flagforma kun pinglo. 15 x 11mm. **Prezo:** 1,80 gld.

Insigno n-ro 25a. Verda stelo, 12mm., kun kluĉilo. **Prezo:** 1,50 gld.

Ŝlosilringo, kun orkolora medalo (verda stelo kaj la vorto "Esperanto") sur artleđa tenilo. Eld. Triesta Esperanto-Asocio. **Prezo:** 4,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,- guldonoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimуме 3,- gld.**

Tel-aviva „Krokodilo”

ŜAJNAS, ke la partopreno de granda grupo el Israelo en la pasintjaraj kongresoj en Tesaloniko kaj Ateno akcelis la disvolviĝon de la junulara Esperanto-movado en la lando. Artikoloj pri la kongresoj, Esperanto kaj israela junulara E-movado aperis en la plej gravaj israelaj ĵurnaloj, kio siavice rezultigis altan nombron da aliĝoj en la novaj Esperanto-kursoj, ekzemple en Tel-Avivo aliĝis pli ol 70 gejunuloj.



Sekve de tio, la Tel-Aviva Junulara Esperanto-Grupo realigis sian malnovan ideon — fondi specialan E-klubon por la junularo. Ĝi portas la amuzan nomon „Krokodilo” kaj celas servi kiel efika varbilo por amikoj kaj dubantoj, kiuj rapide sentas sin logataj de Esperanto-kurso funkcia paralele kun la aliaj aktivecoj de la klubo. Ĝuste tial granda parto de la kluba programo estas hebrelingva, por ke la gastoj kaj komencantoj povu ĝui ĝin. Simile al la monataj kunvenoj de Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI), en la klubo ne mankas amuzo kaj distro, sed okazas ankaŭ prelegoj kaj seriozaj diskutoj. La klubo kunvenas ĉiun duan semajnon.

Amri Wandel

Ankaŭ BEJO estas sen ejo

EN LA PLEJ VASTA sud-amerika lando, Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) suferas pro spacomanko: ĝi serĉas taŭgan ĉambron por loki sian oficejon. Tio estas la demando, kiun BEJO agrese atakas depost la pasintjara 11a Brazila Seminario de Esperanto, okazinta en julio en la ĉefurbo Brazilio. Principe estas atingita interkonsento, ke sidejo de BEJO estu ĝuste en la federacia ĉefurbo, kiu dum la lastaj jaroj ludas ĉiam pli gravan rolon en la brazila Esperanto-movado. Tie aperas ankaŭ la plej regula movada periodaĵo en Brazilo, bulteno de la Brazila Konsilantaro de Esper-

AVERTO PRI „KONTAKTO”

La abonantoj de *Kontakto*, revuo de TEJO, bonvolu noti, ke en marto 1977 aperis la n-ro 50, kio estas la dua kajero en la jarkolekto 1976. Nun oni pretigas duoblan numeron 51/52, per kio kompletigos la jarkolekto 1976 kaj malfermiĝos la vojo al la n-roj de 1977 kaj ĝisdatiĝo de la revuo.

anto, kies redaktorino Maria Almada promesis regulan spacon en la bulteno por la bezonoj de BEJO. Krome, en la ĉefurbo vivas ankaŭ Néia Lúcia Souza, aktiva vicprezidantino de la junulara organizaĵo. Ŝi estas unu el ŝajne dekoj da vicprezidantoj de BEJO, kiu praktikas brazilan movadan kutimon, laŭ kiu gvidanto de ĉiu loka grupo aŭtomate fariĝas vicprezidanto de la komuna landa organizaĵo.

Tamen, krom la ejoserĉado, BEJO disvolvas ankaŭ aliajn aktivecojn. Gejunuloj gvidas plurajn Esperanto-kursojn tra la vasta lando, verkas artikolojn por la junulara gazetaro, havas aktivan sportan fakon kun teamoj por tablotenis, polmoludo kaj futbalo. La arta fako de BEJO intencas okazigi esperantistan kantkonkurson en la kadro de la ĉi-jara 12a Brazila Seminario de Esperanto, havanta ĉiujn trajtojn de nacia Esperanto-kongreso, okazonta en Santos inter la 14a kaj la 18a de julio.

**JU PLI VI PROKRASTAS,
DES PLI ILI KRESKAS ...**

IJK-kotizoj

**33a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
1977 08 09 — 08 16, Poitiers, Francio.
Junulara Esperantista Franca Organizo,
4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio**

Aĝo de la kongresano	Ĝis 1977 06 30		Post 1977 06 30	
	F.f.	Gld.	F.f.	Gld.
malpli ol 18 j.	355,00	177,50	375,00	187,50
18 - 21 j.	370,00	185,00	395,00	197,50
22 - 25 j.	390,00	195,00	415,00	207,50
26 - 29 j.	420,00	210,00	445,00	222,50
pli ol 30 j.	450,00	225,00	475,00	237,50

Individuaj membroj de TEJO/UEA ĝuas rabaton de 25 francaj frankoj (12,50 gld.).

Poŝtĉekkonto: 31 709 94 Y, La Source, por JEFO.

La kotizojn oni, kompreneble, povas pagi ankaŭ pere de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Rumanio

• La prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, sendis meze de marto kondolencleteron al la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato, lige al la katastrofa tertremo, kiu trafis Rumunion antaŭ nelonge. El la leteroj, kiuj lastatempe atingis la Centran Oficejon el Rumanio, ne montriĝas, ke iu rumana esperantisto pereis dum la tertremo, kiu certe lasos negativajn spurojn ankaŭ je la tiea Esperanto-agado, ĝuste antaŭ la katastrofo notinta tre gravajn — kvankam ankoraŭ ne konfirmitajn — atingojn rilate la oficialiĝon de la nacia E-movado.

Italio

• En la Palaco Vecchio en Florenco, la 17an de februaro 1977 okazis kultura solenaĵo sub la nomo "Lectura Dantis". Temis i.a. pri deklamo de fragmentoj el la *Dia komedio* de Dante. Kvankam la programon organizis du neesperantistaj kulturaj asocioj, oni deklamis en la itala lingvo kaj en Esperanto. Samloke oni organizis negrandan ekspozicion de Esperanta literaturo kaj dokumentoj pri la Internacia Lingvo. Parolis i.a. la fama specialisto pri Dante, prof. N. Guarducci, kaj ĉeestis ankaŭ itala senatano P. Bargellini.

Svedio



• Sveda Esperanto-Federacio (SEF), kiu gajnis la Pokalon Fyne, kiel la plej bona landa asocio de UEA en 1975, decidis pludoni la trofeon al Esperanto-Klubo de Västerås, kies aktivecon en 1976 la estraro de SEF trovis la plej premiinda en Svedio. Laŭ la regularo pri la Pokalo Fyne,

tiu trofeo ĉiun duan jaron estas aljuĝata al la plej bona landa sekcio de UEA, por en la intertempa jaro resti ĉe la plej bona loka grupo de la premiita landa asocio. La Klubo en Västerås meritis la premion pro "aktiva serĉado de novaj vojoj aktu-

aligi la ideon de Esperanto; pro la nekonvencia agado de klubo, kiu ĉefe dediĉas sin al stablo de kontaktoj kun aliaj organizaĵoj. . .", kiel argumentas la estraro de SEF. Estas interese noti, ke unu el la klubanoj de Västerås, s-ro Victor Janheim, fine de 1976 faris vojaĝon al Srilanko kaj Hinda Unio, kaj tie havis tre utilajn kontaktojn kun la loka esperantistaro.

Japanio

• Por la unua fojo en la lastaj jardekoj, ĉiuj grandaj Esperanto-organizaĵoj de Japanio agas komune en nun okazanta, tre vasta informkampanjo pri la Internacia Lingvo. La kampanjo "atakiŝ" i.a. centon da amaskomunikiloj. Oni eldonis specialan 40-paĝan informlibreton. La unua rezulto de la kampanjo estas Esperanto-kursoj en ĉ. 60 japanaj urboj. Pro la ĝenerale bonaj ligoj de Japana Esperanto-Instituto kun la nacia Unesko-komisiono, ne estis malfacile atingi, ke la kampanjon aŭspiciu Japana Federacio de Unesko-Asocioj.

Svislando

• Kvankam unu el la plej malmultnombraj landaj sekcioj de TEJO, Svisa Esperanto-Junularo (SEJ, 5 Cure, CH-2035 Corcelles) montriĝas tre aktiva, kun ampleksa kalendaro de esperantistaj aranĝoj por gejunuloj. La sekvanta ero en tiu kalendaro

estas la 37a Junulara Semajnfino en Ĝenevo, okazonta de la 23a ĝis la 25a de aprilo ĉi-jare. Oni povus nomi la aranĝon teatra, ĉar ĝia programo antaŭvidas intensan okupiĝon pri teatraĵoj, kiujn SEJ intencas prezenti poste ankaŭ ekster siaj kadroj. La aktiveco de SEJ aparte bonvenas nun post la decido, ke la 64a Unive-rsala Kongreso okazu en 1979 en Svislando.

Malto

• Kvankam relative malgranda organizaĵo — cetere ankaŭ la lando mem ne estas tre vasta — Malta Esperanto-Societo dum la lastaj jaroj disvolvas tre viglan aktivecon, kiun grave subtenos la apero de la lernolibro (v. la paĝon 67) de Karmenu



Mallia (meze sur la foto, kun okulvitroj). Dekstre sur la foto estas s-ro A. Mercieca, kasisto kaj gvidanto de oftaj kursoj. Ĉi tie du kursfinintoj akceptas siajn diplomojn pri lingvokono de Esperanto. Malta Esperanto-Societo kolektive abonas por siaj membroj nian revuon.

Fervojistoj

• Problemojn, nekutimajn en la Movado, spertas ĉi-jare la fervojistoj: Jam antaŭ la fino de 1976 al la 29a Kongreso de IFEF, inter la 13a kaj 20a de majo, en Swanwick (Britio), aliĝis 350 personoj, kio estas la maksimumo akceptebla en la luprenita kongresejo kaj rezervitaj hoteloj, ne nur en Swanwick sed ankaŭ en la apudaj lokoj. Tial jam komence de februaro ekzistis ĉ. 150 personoj, kies aliĝilojn oni ne povis trakti pro la plenuzitaj kapacitoj. Simile estas kun la 18a Eŭropa Feriosemajno, kiun en Wengen (Svislando) komen-

ce de septembro organizas Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ankaŭ por tiu aranĝo jam komence de februaro ĉiuj disponeblaj 109 lokoj estis okupitaj. Ĉio ĉi aparte ĉagrenas la ĉefajn organizantojn de la du aranĝoj — H. Barks en Swanwick kaj E. Glättli en Wengen.

Kongresoj

• En nia kalendaro de la ĉi-jaraj E-aranĝoj (v. la martan n-ron, p.50) erare mankas informoj pri la 72a Kongreso de la Skota Federacio Esperantista. Ĝi okazos inter la 13a kaj 15a de majo 1977 en Alloa.

Adreso por pliaj informoj: F-ino Anne Eyre, 17 Kalvin Gardens, Hamilton ML5 9NR, Skotlando. Krome, la ĝusta adreso de la 37a Hispana Kongreso kaj de la 19a Katoluna E-renkontiĝo estas: Centro de Esperanto Sabadell, Apartado 407, Sabadell (Barcelona), Hispanio.

Seminarioj

- Kroatia Esperanto-Ligo organizas ankaŭ ĉi-jare, inter la 6a kaj 22a de julio, en la konata Esperanto-kampadejo Primošteno (ĉe la Adria maro) pedagogian seminarion. Ankaŭ en ĉi tiu — 18a laŭvice — aranĝo funkcios apartaj kursoj je kvar niveloj: komenca, konversacia, progresinta kaj instruista. Kompleta 16-taga restado kostas 1950 dinarojn. Pliaj detaloj ĉe: Kroatia Esperanto-Ligo, Poŝtfako 703, YU-41001 Zagreb, Jugoslavio.

- Post bonaj spertoj en Ateno dum la 61a UK, ankaŭ en Rejkjaviko okazos speciala seminario por la instruistoj de Esperanto laŭ la fama metodo de Andreo Cseh. Ankaŭ ĉi-foje la seminarion verŝajne gvidos sendube la plej konata aktiva instruistino laŭ ĉi tiu metodo, s-ino M. Haudebine, honora membro de UEA. La seminarion organizas Internacia Esperanto-Instituto (Riouwstraat 172, Den Haag-2011, Nederlando). La aliĝkotizo estas 50,00 gld. aŭ 70,00 gld. kun la kursolibro de la metodo, — ĉio pagebla al pĉk nederlanda 16 26 26.

Filatelio

- Du interesaj poŝtaj stampoj estis uzitaj lastatempe: En la brazila urbo San-Paŭlo, en decembro pasintjare, la poŝto uzis belan stampon pri la Tago de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu estas leĝe oficialigita festotago en tiu brazila ŝtato. En Belgio, komence de ĉi tiu jaro, Esperanto-grupo de Verviers pagis la sumon de 2000 belgaj frankoj, por ke la stampo "Espéranto — la langue internationale" troviĝu sur ĉiuj miloj da leteroj, kiuj dum unu monato forlasis la lokan poŝtoŝtation.

Libroj

- Pro la translokiĝo de ĉiuj librostokoj de Stafeto el Kanariaj Insuloj al Kopenhago (v. nian numeron de januaro 1977, p.2), neniuj el tiuj eldonaĵoj estos haveblaj antaŭ septembro ĉi-jare. La Libroservo de UEA petas siajn klientojn konsideri tion ĉi okaze de siaj novaj mendoj.




Prelegvojaĝoj: F-ino Mikiko Mimori, pri kies eŭropa vojaĝo ni skribis en la februara numero (p.28), lastatempe estis en Britio, kie ŝi gastprelegis i.a. en la jara konferenco de la Brita Origami-Asocio en Kembridge. Unu el ŝiaj esperantlingvaj prelegoj pri la japana paperfalda arto — origami — okazis la 7an de marto en vespera Esperanto-kurso de s-ro Raif Markarian en Ĥefildo. Sur la foto (kiun ni dankas al s-ro Markarian) estas parto de tiu vespera kurso, kun f-ino Mimori maldekstre.

Persone

Damjanov

- La 21an de februaro 1977, en la salono de la Hebrea Kulturdomo en Sofio, okazis amase vizitita recitalo en Esperanto de la bulgara kantisto Veselin Damjanov, laŭreato de internaciaj festivaloj, bona konato



de la esperantista kongresa publiko dum la lastaj jaroj. En la programo, kiun akompanis elstara sofia pianisto Evgeni Komarov, troviĝis klasikaj arioj kaj popularaj kantoj, pluraj kun tekstoj originale verkitaj en Espe-

ranto. La solista koncerto de Damjanov (sur la foto) estis dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco.

Egami

- Laŭ raporto de la novaĵagentejo UPI, prof. d-ro Fujio Egami, membro kaj antaŭe komitatano de UEA, atingis gravan sciencan rezulton en la instituto pri biologiaj esploroj, kiun li estras en Tokio. Nome, grupo da sciencistoj, sub la gvido de prof. Egami, sukcesis kulturi senvivajn ĉelojn, unuafoje en la historio de la biologia scienco.

Setälä

- La 4an de aprilo 1977, Vilho Setälä, honora membro de UEA kaj unu el la plej eminentaj agantoj sur la kampo de la Internacia Lingvo, fariĝas 85-jara. Estas admirinde, ke la jubileanto ankoraŭ plene aktivas, i.a. kiel gvidanto de Fondumo Esperanto, unu el la plej grandaj movadaj eldonejoj. Setälä, apartenanta al la elito de la plej brilaj pedagogoj en la historio de Esperanto, ĵus reviziis por nova eldono sian faman internacian lernolibron *Privilegia vojo*, kiu jam vendiĝis en dekmiloj da ekzempleroj.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1976, p. 66-67. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 25.42 m (11800 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 43.35m (6920 kHz), 40.82m (7350 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 31.95m (9390 kHz), 25.04m (11980 kHz). I.
20.00-20.20 Romo, 50.08m (5990 kHz), 41.24m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63 m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.82m (15140 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz),

13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.) . Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). I.P. (Ĉiun kvaran mardon).
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6080 kHz). I. Ibra Radio, Box 396, S-101 25, Stockholm, Svedio.
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz).
Ripeto de la lunda programo.

Merkredo

12.20-12.30 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

Vendrede

12.20-12.30 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.
20.00-20.30 Pekino, 47.85m (6270 kHz), 43.73m (6860 kHz), 31.98 m (9380 kHz). I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49m, 41m; 2) dum la svedlingva programo ĉiun duan mardon de la 16.00 ĝis la 16.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; 3) dum la danlingva programo sabate de la 15.30 ĝis la 16.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 31m.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo, Ibra Radio.
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sudorienta Azio).
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.82m, 19.44m, 16.83m, 13.94m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

SOCIETO ZAMENHOF 1977

AŬSTRAL: 144 E.W. Woodruff. FINN: 145 Helmi Koivuniemi; 146 Lauri Lempinen. FRANC: 147 H. Dabezies. FRG: 148 Ellen Eggers; 149 Hans Schütt. HISP: 150 G. Flores Martin. NOR: 151 Margrete Landmark; 152 Olav Reiersøl. SVED: 153 D. Kullberg; 154 Gösta Persson; 155 Einar Rasmussen; 156 Eugen Rytenberg. US: 157 Rose Norlund. BELG: 158 André Degryse. BRAZ: 159 F.S. Almada; 160 Marija P. Almada. BRIT: 161 W.G. Atkinson; 162 E.B. Knight. FRG: 163 H. Bily. ISR: 164 J. Giladi. NED: 165 C. Bossong-Singer; 166 H. Veenstra; 167 E.J. Woessink; 168 A. Woessink-Nagata. US: 169 B.J. Balcar; 170 Stefan Chobanoff; 171 W.W. Glenney.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1977 06 15 neniun membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

ACOROJ: Manuel Gomes, D kaj FD (geografio), Silveira. BRAZ: L.A. de Oliveira Coelho, JD, Paraíba do Sul. BRIT: Mary Frith, D, Bridlington; Kenneth Twinn, D kaj FD (lingvoj), Ditchling; Frank Curtis, VD kaj FD (fervojoj), Gloucester; Frances Slack, D kaj FD (geografio), Walberswick. BULG: Rajna Stančeva, VD, Ŝumen. ĈEHOSL: František Patera, D, Hořice; Naděžda Zedníčková, D, Lanškroun; Karolo Pič, D, Litomyšl; Jaroslav Skramuský, D, Poděbrady. FINNL: Vilho Penttillä, FD (handikapuloj), Helsinki; Reino Eriksson, D, Iisalmi; Martta Halonen, D, Kajaani; Lauri Häkli, D, Kyröskoski; Hannes Vihermä, D, Lahti. FRANC: François Mesplède, FD (turismo), Arcachon; Raoul Melo, FD (filatelo) kaj (renovigita astrologio), Bellerive sur Allier; Joseph Catil, FD (PTT), Meyzieu; Pierre Petit, FD (popoluniversitatoj), Nyons; Raymond Doury, FD (modcivitaneco), Paris; Jean Lezan, D, Périgueux; Fernand Ditacroute, D, Razac sur l'Isle; Robert Marais, D kaj FD (negoco por

domkonstruo), St.-Aubin de Luigné. FRG: Wolfgang Loose, FD (ŝako), Schwelm. GDR: Alois Jauernig, D, kaj FD (edukado) kaj (filatelo), Sangerhausen. HUNG: Antal Jaró, FD (fervojoj), Nyiregyháza. ISL: Hallgrímur Sæmundsson, D, Garðabær. ISR: Ŝmuel Mizeruĥa, D, Kirjat-jam. NOV-ZEL: Don Cornes, D kaj FD (turismo), Whangarei. SVED: Ivar Paulsson, FD (filatelo), Solna. US: John Grund, FD (tarifo kaj trafiko de ŝargaviadiloj), Bay Shore; Minerva Massen, D, Daly City; Marion E. Bigelow, D, Fresno; Josefo Delpino, D kaj FD (lingvo: hispana), Queens.

ekzameno
Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 10

(pri la demando v. nian martan numeron, p.59)

A. Richard Henry Geoghegan (1866-1943) estas verŝajne la unua angleparolanta esperantisto. Li



studis la ĉinan lingvon en la Universitato de Oksfordo. En Alasko li dediĉis sin al la studo de la indiĝenaj lingvoj kaj verkis vortaron kaj gramatikon de la aleŭta lingvo. En 1905 li


estis elektita ano de la Lingva Komitato. (V. ampleksan artikolon pri Geoghegan en nia revuo de novembro 1974, p.188).

B. Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957) naskiĝis en Bohemujo. En 1890 li eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj. Li devis elmigri pro politikaj kialoj kaj, fariĝinte brazila civitano, li oficis kiel tradukisto, ŝtata oficisto kaj lernejestro. Lia verko *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo* (1947) enhavas mediumajn poemojn de pluraj poetoj.

C. Eŭgeno Adam (1879-1947), kiu estas pli bone konata per sia pseŭdonimo Eŭgeno Lanti, estis la fondinto en 1921 de Sennacieca Asocio Tutmonda, internacia laborista Esperanto-organizaĵo. Li redaktis *Sennacieca Revuo* kaj pritraktis sian propran liberecanan doktrinon, la sennaciismon, en verkoj kiel *For la neŭtralismon!* (1922) kaj *Manifesto de la sennaciistoj* (1931).

Ĉ. Edmond Privat (1889-1962) faris sian unuan vojaĝon al Anglujo kaj Usono por lerni la anglan lingvon kaj propagandi Esperanton. Vojaĝante en la orienta Eŭropo dum la unua mondmilito, li interesiĝis pri la problemoj de naciaj minoritatoj. En la 1920-aj jaroj li laboris en la Ligo de Nacioj, kaj rezulte de liaj klopodoj, la Ligo okupiĝis pri la rolo de Esperanto en la edukado kaj la telegrafio.

D. Vasilij Eroŝenko (1890-1952) verkis fabelojn en Esperanto kaj en



la japana lingvo. Forpelita el Japanujo pro politika agado, li iris al Ĉinujo kaj en 1922/1923 instruis Esperanton en la Universitato de Pekino kaj ankaŭ prelegis en Espe-

ranto pri la rusa literaturo. Li estis premiita en la nurenberga kongreso (1923) pro la deklamo de sia poemo "Ciganino". Du volumoj de rakontoj aperis en 1923: *Turo por fali* kaj *Rakontoj de velkinta folio*.

DEMANDO 11

(la respondo aperos en nia maja numero)

Kompare kun la plimulto de aliaj planlingvoj, Esperanto montras rimarkindan stabilecon. Oni povas legi tekston verkitan de Zamenhof antaŭ 90 jaroj same facile kiel artikolon en tiu ĉi numero de *Esperanto*. La relative malgranda nombro de novaj vortoj, same kiel en iu ajn vivanta nacia lingvo, ne malhelpas la komprenon, sed tutsimple montras, ke la lingvo daŭre ĝisdatigas sin por respeguli la ĝeneralan kulturan evoluon.

Tamen, ekzistas kelkaj tekstoj en tiel nomata "arkaika" Esperanto, kiuj iel diferencas disde la "klasika" lingvo. Ĉi-sube estas tri ekzemploj. Unu estas aŭtentika formo de pra-Esperanto verkita de d-ro L.L. Zamenhof antaŭ ol li donis al Espe-

ranto ĝian definitivon formon. Alia teksto estas provo provizi Esperanton per arkaika lingvoformo por la celo traduki historiajn dokumentojn en malnovaj formoj de naciaj lingvoj. La tria estas intence ŝerca provo krei malnovan Esperanton. Ĉu vi povas identigi ilin?

a. Widats wui, confratruy, quio nui estams? Ya pulvu kaj cindru estams. En quiomt graceu principe Diu creays nuialn praun Adamun kay donnays ad llui paradisum quiele domun.

b. — Petolam Capom cay phortaj Bracoy, benot Diom Spadon cay Phiphron.
— Tuid soldatan Costumon pharoms.
— Tuyoe? stziwolit eshi.
— Tuyoe! respondit Strigospegulom. Cuyu des asertit que Phragoy ityel bonegoe gustat in Matenom? Multoe plid bonoe gustat Bushom tuam!

c. Bella sero jal urbetto
Lue fio brué
E il rondo un puettaŭ
Dolce deklamé.
E pri vivo pri nantassa
Sante ŝo pallá
E ma blesso ne koprasa
Plescie veksá

Posedantoj de materialo pri multflanka agado de forpasinta s-ano H. Paruzel estas afable petataj sendi ĝin ĝis la fino de aprilo al: C. Biedulski, Kapucynska 4, PL-00-245 Warszawa, Pollando.

Memoru, ke la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso.

Ni deziras leterojn, bildkartojn kaj Esperanto-gazetojn por propaganda ekspozicio. Bonvolu sendi antaŭ la 30a de majo al: Esperanto-klubo de Halmstad, Norra v. 11, S-302 31 Halmstad, Svedujo.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, bonvolu jam sufiĉe frue skribi al la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) por peti utilan informilon.

Parolu tutmonde per sonbendoj aŭ kasetoj. Membreco al VOICESPONDENCE CLUB (Usono) kostas 4 dolarojn jare. Vi ricevos anglalingvan adresaron de membroj (inter kiuj esperantistoj) kaj kvaronjaran publikaĵon. Pliajn informojn ĉe: Daniel Luez, 1, rue Faglain, F-02000 Laon, Francujo.

Interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi deziras: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık Sokak 23, İstanbul, Turkio.

Jaroslav Matvijiŝyn (USSR, 252001 Kiev-1, do Vostrebovania) serĉas filatelkontaktojn.

Kun triamondaj landoj volas korespondi: P.I. Ereno, Banierstraat 82A, Rotterdam.

S-ro Pierre Delaire, B.P. 2002, 45010 Orléans Cédex, Francio, serĉas ĉiujn gekorespondantojn por siaj diversaĝaj kaj diversurbaj gelernantoj. Transdonos la leterojn sed ne respondos.

Deziras korespondi: Alvacy Plauda, Poŝtkesto 7139, 80000 Curitiba/Paraná, Brazilo.

Skribu de ĉie por ekspozicio. Bildkartoj kaj turismaj prospektoj bonvenaj. G.E.V. 49, avenue de Saint Cloud, F-78000 Versailles, Francio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Skribante al UEA, bv. afranki filatele kaj enmeti uzitajn poŝtmarkojn. Tiel vi helpas la Asocion. Koran dankon!

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Korespondemuloj serĉantaj japanajn korespondantojn, skribu al Japana Esperanto-Korespondo-Servo; ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Pasporta servo de TEJO: Petu informojn de J.M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts le Roi, Francio. Ĵus aperis la 4a listo de gastigantoj: 20-paĝa libreto kun 240 adresoj en 40 landoj. Aĉetebla per 10f.f. aŭ 8 irk. al pĉk. 25 426-58 Paris.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francio, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Gimnazia instruisto volas korespondi kun kursgvidantoj: Mihai Trifoi, C.P. 15, R-4925 Sighetul Marmației, Rumanio.

Faktoj pri Islando, 72-paĝa libro, por nur 0,50 dolaro aŭ egalvaloro. Mendebla ĉe: Islanda Esperanto-Asocio, Pk. 1081, Reykjavík, Islando.

Por ne forgesi la lingvon, mi volonte akceptus donace uzitajn E-revuojn kaj librojn. Antaŭdankas: s-ro Johano Beleznaï, Hospitalo Alexius, Paulus Station, D-4040 Neuss, FR Germanio.


Post longdaŭra silento korespondus f-ino Correy, 21 rue de la Préfecture (CIO), F-25000 Besançon, Francujo.

Volontulo por Libroservo

La Libroservo de UEA estas la plej granda movada librovendejo. Ĝi nun vendas ĉ. 2000 diversajn titolojn, kio praktike egalas al ĉio aĉetebla en la Internacia Lingvo. Tiu granda vendejo dum la lastaj tri jaroj funkcias ĉefe per helpo de la Volontula Servo de UEA. Jam ses volontuloj el kvar landoj pasigis iom da tempo en tiu unika lernejo pri la Esperanta literaturo, libro-komerco, Esperanto-movado aŭ alia studobjekto, depende de la propra intereso. Nun vakas loko por la sepa volontul(in)o. Se vi estas malpli ol 29-jara, se vi havas konvenajn talentojn aŭ interesojn kaj se vi povas esti libera dum unu jaro aŭ iom malpli, petu specialan demandaron de la Centra Oficejo de UEA.

Librotenisto

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam serĉas novan libroteniston por baldaŭa enoficiĝo. Salajro dependos de sperto kaj kvalifikoj. Bezonataj: adekvata scio de Esperanto, kompreno de la klasika sistemo de librotenado, sperto kun libroten- kaj kalkul-maŝinoj. Krome dezirata: kapablo memstare kompili bilancon. Petu detalan respondilon ĉe la direktoro de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Tel. (010) 36 15 39.



Librotena maŝino en la Centra Oficejo



Amuzate vi iros al la celo per



internacia lerneja esperanto-revuo
jarabono (3 n-roj) ĉe UEA: 5,70 gld.

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: **s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.**

HELSINGÖR 1977

(sub la aŭspicio de UEA)

En la Internacia Altlernejo, Helsingör, Danlando, okazos Internaciaj FERIAJ Esperanto-kursoj de la 24a ĝis la 30a de julio 1977. Ni invitas vin ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en vere internacia rondo.

Atentinda estas la fakto, ke la eminenta kaj en la esperantistaj rondoj tre bone konata s-ro Reto Rossetti gvidos la perfektigan kurson. La ceterajn tri kursojn gvidos la samaj instruantoj kiel pasintjare. Kaptu la okazon komenci la lernadon aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe: **s-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingör, Danlando**

post la senriproĉa
monda monsistemo
nun nova projekto:

internacia aboco

por nomoj kaj fremdvortoj

ebligos ĝustan prononcadon

öS 54,— al d-ro J. Hartl, pĝk. 7 503.218 Vieno.

Don Quijote survoje

La tutmonde fama klasikaĵo hispana *Don Quijote de la Mancha* jam estas kompostata kaj aperos en la genia Esperanta traduko de Fernando de Diego, proksimume en junio ĉi-jara, en formato 17,5 x 25cm, ilustrita, "Milskin"-bindita, 672-paĝa. Ĝia proksimuma prezo estos 1.500 pesetoj por ĉiu ekzemplero. Por antaŭmendoj, kun samtempaj antaŭpagoj, ricevitaĵ gis la 30-a de majo, la prezo reduktiĝas al 1.000 pesetoj.

Mendojn kun pagoj oni sendu al: **Inés Gastón, PO Marina Moreno, 35, 4^o dcha, Zaragoza-1, Hispanujo.**

KRUKO KAJ BANIKO EL BERVALO

*Kruko kaj Baniiko
el Bervalo*



ANKORAŬ HAVEBLAS la jam (fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vigle ilustrita originala ridincitilo kun la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj" tiel furoris tra la mondo, ke la unua eldono el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis havebla nur prunte aŭ ŝtele. Sed nun vi povas aĉeti kaj posedi propran ekzempleron.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) guldenoj.

UN kaj Ni



Baldaŭ aperos la 5a numero de ĉi tiu periodaĵo, kiun eldonas la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de UEA kaj redaktas **Akiko Woessink-Nagata**. En ĝi vi trovos multajn novaĵojn pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj specialigitaj organizaĵoj de UN. Petu provekzempleron de la Centra Oficejo de UEA. Abono: 20,00 (por Nederlando 20,80) gld. por 10 numeroj.

Ekzistas loko por

sekretari(in)o

en la Centra Oficejo en Rotterdam, en la kadro de la Volontula Servo de UEA. Kandidatoj devas esti minimume 18-jaraj kaj maksimume 29-jaraj. La servo-periodo estas maksimume 1 jaro. Estos pagataj la nuraj restadkostoj (loĝado, manĝado), asekuro kaj eventuale parto de la vojaĝkostoj. Ekdeĵoro iam ajn.

Estas bezonataj bona scipovo de Esperanto, precipe skribe, kaj rapida tajpkapablo. Oni devas esti preta tajpi leterojn laŭ diktomaŝino kaj mem trakti leterojn laŭ simplaj instrukcioj.

La sukcesa kandidat(in)o havos okazon funde konatiĝi kun la aktuala stato kaj organizo de la monda Esperanto-movado kaj eventuale povos akiri praktikan sperton ankaŭ pri aliaj oficejaj laboroj. Petu demandaron de la Centra Oficejo.

Jen la unua frukto de la kunlaboro inter la eldonistoj J. Régulo kaj T. Kehlet:

Robindronath Tagor PRIMICO

Poemaro de la mondfama bengala poeto, nobelpremiito, en majstra, eble eĉ epokfara traduko de juna bengala lingvisto **PROBAL DAŜGUPTO** (naskiĝis en 1953).

Ilustrita per vinjetoj de **Dhirendro-Nath Brohmo**. 114p. 19cm. ISBN 87 87089 04 1.

Prezo: 24,00 danaj kronoj ĉe Esperanto-Centro, DK-8000 Aarhus, Danlando, aŭ: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld. ĉe la Libroservo de UEA.



STAFETO